61 (79) JULIO / AŬGUSTO 1985 ISSN 0150-5823

Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista

Unu numero : 4 FF. Unujara abono kun adresaro : 25 FF

Ĝiri al la poŝtkonta numero 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto :

Cercle amical esp. de l'Agenais, F 47340 Laroque Timbaut

******************************************************

# L!..., ĈU PROVOKEMA ?

Al tia demando eble kelkaj novaj legantoj de tiu ĉi numero senhezite ekkrios : "Ho jes, certe !" Kaj tamen ilia spontana reago ne situos sur la tereno de vero. Unue, la nocio "provoko" estas tute subjektiva : sama artikolo povas ŝoki iujn kaj ŝajni banala al aliaj. Precizan ekzemplon oni povus citi : post la apero de la frontartikolo : "Himno al la ĝojo" (L! 58) alvenis tute malaj reagoj : laŭdaj kaj mallaŭdaj. La n-ro 61 enhavas viglan prelegon pri la sakra "arto" kun - nature - tre precizaj aludoj pri seksaj aferoj. Kio ŝoka ? Ĉu la vortoj, ĉu la temo ? Fakte, la formulo de "Laŭte" implicas liberan esprimeblon pri ĉiaj temoj, kaj ne kulpas la formulo, se en ies mensoj restas tabuoj. Ĉar fakte la dua eraro de tiuj, kiuj juĝas la gazeton provokema, estas doni personecon al UJO, kies enhavo ja dependas tute de tiuj, kiuj plenigas ĝin.

"Tamen - iuj grumblos - ĉu ne freneze pridiskuti cirklan kvadraturon, prezenti detale la tezon de "analizistoj" pri E-gramatiko, kaj samtempe lasi esprimiĝi plej frenezajn proponojn (ĝi, ĝili, kjel...) kontraŭ la sankta Fundamento ?"

Al tiuj demandoj permesu, ke respondu ne la (ĉu tro komplezema?) redaktanto, sed la abonantaro mem, se ĝi emos, ĉar estas ĝi la vera posedanto de "L!" kaj neniu alia... Kribo

## AMKANTO

"Ŝati la naturon estas bonege ami la homon." (Thoreau)

*Dum belvetera tago, sur kamparo vojo, mi promenadas, ĝuante la ravan pejzaĝon, kiu, kvazaù serio da pentraĵoj, sin prezentas antaù mi kaj kreas serenan etoson. Mi ekskursetas per etaj tretoj, gustumante la solecon, aùskultante la susuron de la insektoj, ekstazadmirante la gutojn de roso, kiuj, el la herberoj falas vestite kun pompaj koloroj, lumigante mil stelojn. Mia rigardo vagas de mirbelaĵo al mirbelaĵo, ĝi ne satiĝas per la aminda spektaklo, kiun oferas la monteto rozkolora pro timiano, la rivero, kiu kantas meze de la florantaj kampoj, la malnova provenca dometo kun ĝiaj du cipresoj similaj al du flamoj. Per la okuloj, la buŝo, per ĉiuj poroj de mia haùto, mi ensorbiĝas en tiu naturo ; mi trinkas ĝin, mi spiras ĝin, mi banas min en ĝi ; mia spirito estas nesatigebla kaj ĉiam volas malkovri. Mia koro estas kiel arbaro loĝata de birdoj kaj en ĝi estas pli da muziko ol en la plej belaj kantoj de orgeno kaj violono. Mi sentas min en harmonio kun la naturo, kiu estas parto de mi.*

*En tiu reĝlando de paco, kie mia animo malvolviĝas kiel grandega velo teksita de steloj, estas bone mediti. Mi pensas pri la franca poeto, kiu skribis : "Kie ajn vi estas, restu kun la memoro de via ravo."*

*En tiu mondo de silento alvenas al mi nur fratecaj voĉoj, koraj krioj, muziko ankaù...*

*La suno ekverŝas siajn kisojn al siaj teneraj floretoj, tiam la lumo, la mirinda lumo provenca ekdancas kiel sovaĝa ĉevalo ; ĉio fariĝas fajro : la okro de la tero, la verdo de la vegetaĵoj, la bluo de la lazuro. Antaù tia pejzaĝo ni devas esti humilaj, preni la tempon de la halto kaj silenti. Ni lernu malfermi la okulojn por malkovri mondon en sablero kaj paradizon en kampa floro. Vivi estas kredi, diras la proverbo, sed pli ankoraù, vidi estas vivi. Ju pli vi ekzercas vin por vidi, des pli vi sentas vin vivantaj. Jen strangaj floroj : ili aspektas kiel papilioj, kiuj malebligitaj forlasi siajn tigojn, flugigas siajn animojn en formo de aromo.*

*Jen rosmareno, kiu mirinde bluas, parfumas miajn fingrojn. Estas festo de la aĵoj, kiuj parolas al mi pri la granda sekreto, kiujn ili rakontas al ĉiuj homoj, pri la eterna miraklo ĉiutage malkovrita.*

*Dum tiu promenado mi plukis por vi mildan lekanto-bukedon por ornami vin de luma ombro. Mi plektis por vi kronon faritan de la ventaj murmuroj. Pluku por mi amvortojn kaj ĵetu ilin en la ĉielon, por ke la tuta mondo aùskultu tiun esperkanton...*

**Michèle Freud**

## KIEL SAKRI EN ESPERANTO ?

En la revuo "Franca Esp-isto" (Marto-Aprilo 1984-a), p.13 : *"Dans les langues nationales on peut utiliser différents registres : on peut être familier, respectueux, grossier.. Y-a-t-il l'équivalent en E-o?".* (En la naciaj lingvoj oni povas uzi diversajn tonojn : oni povas esti familiara, respektema, kruda. Ĉu estas ekvivalento en E-o?"). Kaj S-ano Piron respondas : *"Bien sûr. En français, on utilise des registres différents si l'on dit : Un peu de silence, s'il vous plaît! Allons, taisez-vous! ou: La ferme!. En E-o aussi toute la gamme existe allant par exemple de :* ***Bonvolu silenti*** *en passant par :* ***Malpli da bruo, mi petas!*** *puis* ***Silenton!*** *et* ***Nu, nu, ĉu vi ĉesos babili finfine ?"*** (Jes ja. En la franca, oni uzas malsamajn tonojn, se oni diras : "Iom da silento, mi petas. Nu, silentu!" aŭ : Fermu ĝin!. Ankaŭ en E-o ekzistas la tuta gamo...)

Sed tuj mi pensas : "ta gueule", "tu déconnes", mais mon vieux comment tu dis ça?"

Do, ĉu vere oni ne povas en E-o diri "ta gueule" ? Sed jes! tamen tiuj esprimoj ne plu kuŝas en lernolibroj ; jes "la faŭkon"... "Vian faŭkon"... "porko buŝaĉon fermu" "buŝaĉon tenu fermita" "Aĥ do silentu, kaduka kreteno" "ĉu denove vi malfermis la buŝegon!" "Sufiĉas buŝaĉi!" "Fermu la faŭkon!"

Ha! ha! Ĉu do mi povas esprimi koleron, indignon per esperantaj vortoj ? Ĉu entute oni povas tiel vortrukti ? Ho! Fulmotondro ! ekbrilas ideo ! Jes, E-o ne estas nura kodo por balbuti kutimaĵojn, ĉiutagaĵojn, klaĉaĵojn. Mi sentas, ke E-o estas matura lingvo, vivanta lingvo plena de esprimkapablo kaj de plensanga viveco ! Sed kiel esprimi tion ? Jes fakte, kiel sakri en E-o ? Kaj kial do stultulo vi diris al Renée Triolle, ke vi bonvolas fari tion kaj nun, kreteno, vi laboraĉas skribaĉas sed ne dormas ? Kia ŝtipo mi estas ! Jes, morgaŭ mi devos prelegi kaj merdo! mi ne trovas la vortojn, mi ne povas ordigi miajn pensojn. Jen pensoj kirliĝas en mia menso. Kion fari ? Morgaŭ matene mi laboros... poste, tiu fia federacia kongreso... Kelkaj venos por aŭdi kaj aŭskulti min, sed kion skribi ? Ĉio stulta ! sufiĉe da cerbumado ! sufiĉas la racio ! halt' la intelekto ! Ke senpeziĝu mia kapo ; ek! sakru bone, plensente kaj suke. Ke mi vomu vortojn trivialajn, krudajn, nedecajn, jes la fekvortojn, la sakrajn, la maldecajn.. Sed kie estas tiuj vortoj ŝokaj, aĉaj, fiaj ? Jes, tie... kaj kia saniga vort-ŝtormo. Vere ili pli utilas ol preĝo !

Do nun vi scias pri kio mi parolos : per kiaj vortoj esprimi

koleron, malbonhumoron, indignon, malestimon. "kiaj" mi diris, do responde : per nedecaj vortoj, per maldecaj vortoj. Sed kiuj estas tiuj vortoj ? Ĉu mi devas listigi ilin ? Kial ne ? Fakte neniu profesoro instruas ilin. Ĉu vere ? Kial do ? - Ja! mi devas paroli pri tabuaj vortoj. Vi povos rimarki, ke mi ne vidas diferencon inter sakri kaj insulti kaj vidu mem : en PIV ne tro da malsameco.

Ĝenerale, homo sakras, kiam ĵi koleras [mi uzas tiun novismon "ĵi" por "li aŭ ŝi" "li/ŝi" ktp], kiam ĵi estas malkontenta, kiam ĵi furiozas, bolas, flamiĝas, kiam ĵi estas ofendita, humiligita, riproĉita, mallaŭdita, do kiam ĵi timas esti atakata, kiam ludas en ĵi la defendmekanismo. Sur tiu tereno de la emocioj, de la sentoj, ne plu regas racio kaj la homo uzas pseŭdoinstinktajn reagojn por kontraŭstari tion, kio bremsas ĵin, malliberigas ĵin, ĝenas ĵin. La insultanto estas nur timanto pri sia propra vivo. Kaj tia situacio okazas ĉie kaj ĉiam, praprae kaj onte ! La sakranto deziras forigi timon, eble subkonscian, emas forpuŝi la timigilon, kiu povas esti io aŭ iu. Kaj por ne esti ofendita aŭ ĉar ĵi estas ofendita, homo ofendas returne ; granda leĝo : okulon pro okulo, denton pro dento!

Kiamaniere oni povas humiligi homon ? La ĉefa maniero estas senvalorigi ĵin. Mi alvenas al la dorna problemo ! Per kiuj vortoj senvalorigi iun ? Nun nepras paroli pli pri feko kaj fiko ol pri fido. Unue mi pli spertas pri fiko kaj feko kaj due pri Dio, religio, fido kotopo mi ne ankoraŭ spertis. Tamen kelkaj vortoj pri Dio. Multaj sakraĵoj rilatas al Dio kaj al Maldio : diablo, demono, satano (aŭ SAT-ano?) kaj vi bone konas ilin ; mi memorigas kelkajn :

"Mil diabloj!" "Iru al la diablo" "Iru rekte al la infero"
"Damne!" "Diablo vin prenu" "Al Diablo" "Diable!"
"En nomo de ĉielo" "Per Dio" "Pereu malbenita"
"Vi damninda" "Iru inferon" "Malbenite!"

Iom post iom tiuj sakraĵoj formortos kiel Dio en nia nuna civilizo.

Do nun al la feko. Unue kelkaj sinonimoj : feko estas ekskremento eligita el la anuso, fekaĵo estas amaso da fekoj - do sterko ofte - feko estas merdo, merdo estas kako, kaki estas malmanĝi. Ĉiuj el vi bone konas tiun agon kaj ties rezulton. Kio povas esti pli senvalora ol merdo ? Ĉu timulo ne fekas pro timo ? Nun, danke al la necesejoj, forŝprucigiloj, kloakoj, oni ne plu povas tro imagi, bildigi la esprimon "esti en la merdo ĝis la kolo", sed antaŭ ducent jaroj ? kaj ankoraŭ nun en kelkaj vilaĝoj, ĉu ne ?

Tamen vi bone komprenas sen klarigoj, ke oni trafe sakras per fekvortoj. Jen kelkaj :

"Vi merduloj!" "Ne merdpleniĝu la kalsonon" "Aĥ, fek'!"
"Fekaĉu sur lin" "Staru rekte vi merdulo" "Ho vi merdumito"
"Sprucfekulo!"

Evidente ĉio rilatanta al kako povas esprimi la samon. Universalaj esprimoj estas :

"Porko!" "Porkego" "Korpo de porko!" "Furzulo!"
"Ruzfurzulo" "Leku al mi la postaĵon" "Elen vi aĉaj porkoj!"
"Kuru porkaĉoj!" "Porko, ĉu vi volas meti vian sterkaĵon antaŭ mia nazon"

kaj eĉ en la Biblio. Sankta Mateo 7:6 :

"Ne donu sanktaĵojn al la hundoj, nek ĵetu viajn perlojn antaŭ la porkoj. Kaj nun mi ĵetas miajn perlojn al vi!..."

Kako malbonodoras kiel kadavro, do novaj sakraĵoj :

"kadavraĉo" "vermo" "kotulo"

Kaj pere de "porko" mi alvenas al la sakraĵoj rilatantaj al bestoj. Do oni sakras per :

"Hundo" "Skabia hundino" "Hundidoj for!" "Ruzega hundo"
"Vi fiaj hundaĉoj" "Slava (tiel!!!?) hundino" "blato, muŝo, vermo, aĉaj blatoj" "vulpo" "bruto" "rabia bovino" "vipuroj" vipuridoj"

Memoru pri la komunista insulto "lubrikaj vipuroj" (lascivaj vipuroj).

Sed en nia civilizo pli urba ol kampara tiuj vortoj ne tro sencas por multaj inter ni, do ili ne estas sufiĉa trafaj. Evidente oni povas miksi merdon kaj Dion, do vi povas sakri per :

"damna merdo" "dia furzo" "postaĵo de la diablo"
"fekanĝelo" "feko de perfidulo" "dia merdo" kotopo

Sed ĉu la esperantistoj posedas proprajn sakraĵojn ? Ĉar fakte tiuj, kiujn mi citis, estas ja vere internaciaj, universalaj tradukaĵoj (mi pruntis ilin el plej diversaj libroj de ĉiuj kontinentoj).

Ĉu do en Esperantio ekzistas pure E-aj sakroj ? Jes, sed ne multas ili :

"fiulo, aĉulo, fuŝulo"

Pure esperantaj estas la kunmetaĵoj de la vortoj :

"fi, aĉ, ul, fuŝ", ne pli !

Tamen : fiulino, etfiulino, fiaĵo, aĉas, fias fuŝ! fi! aĉ!

Ne gravas, ke ne ekzistas pli da vortoj : la vivo kreos ilin. Ekzistas ankoraŭ la ŝablonaj insultoj, kiujn mi memorigas al vi ; tiuj insultoj iomete tradukas : "fiulo", "aĉulo" :

"ĝisosta malsaĝulo" "kanajlo" "fripono" "idioto" "kreteno" kaj la ĵokeraj : "stultulo" "stultaĵo" "stulte".

La vorto "ŝtipo" estas malofte uzata por "stultegulo" "malĉasta bubo".

Pere de tiu "malĉasta bubo" mi alvenas al la fiko. Fiki estas amori, koiti, karnon miksi, trui, seksumi, geĝui, enpafi, fari paf paf, grotesplori, geglui, kunkuŝi, samliti, interne intervjui... Sufiĉas! kaj oni diras, ke E-o estas malvarma lingvo, robota kodo, maŝina komprenilo! Ne! Kiuj estas la familiaraj, kelkaj eĉ pensus eble vulgaraj - ne bulgaraj! - vortoj, rilatantaj al la sekso : mi citis fiki, sed pri la iloj : jen la lanco staranta, la kaco, la elstara bubo, la fripona bub', la vira membro, la virilo, la ĉjoilo, la am-uz-ilo kotopo kaj jen la piĉo, la ĝua valo, la karna valo, la dolĉa pordo, la ampokalo, la ine ringa ingo, kaj jen la ĉuro, la sorĉa semo, la sankta suko, la ama lakto kaj fine jen la ĉurovoj, la kojonoj kotopo. Sed mi ne volas profani sakramenton kaj senvalorigi virinojn. Kiel do mi povas diri, traduki la francan vorton "con". Piĉo utilas amplene, sentriĉe, ĝuhave. Do "piĉ!" ne povas uziti por traduki "con". En "piĉ" estas la konsonantoj "p" kaj "ĉ", do mi gardas ilin kaj la framo de la nova vorto estas : ĉ-vokalo-p. Kia vokalo ? a, e, i,u ne taŭgas, ĉar estas jam kelkaj vortoj, kiuj komenciĝas per ĉa, ĉe, ĉi, ĉu. La vokalo o taŭgas plej bone kaj ekzistas nur unu komuna vorto kun ĉo, estas ĉokolado, do konfuzo ne eblas.

Jen novnaskita vorto en E-o : **ĉop** por esprimi stultecon, stultulon, pasivecon, idiotaĵon, idioton, kotopon.

Ĉu mortnaskita vorto ? Eble ! Tamen oni devas proponi. Jen nun kelkaj trafaj esprimoj :

"Ne ĉopu!" "ĉesu viaj ĉopaĵoj " "Vi ĉopaĉo" "vi ĉopeto"
"ne ĉiam ĉopadu!"

Ĉar eble mi mistraktas virinojn, ŝili (novismo!) povas diri :

"aĥ vi kojono! ne kojonu!"
"ĉesigu viajn kojonaĵojn!"
"la viroj...hm!...lili(novismo) nur kojonadas!".

Mi esperas, ke debato okazu poste kaj se mi aŭdos : "Via prelego estas fiĉopa, ĉopaĉa kaj vi, nur ĉopego", tiuj insultoj estos veraj komplimentoj ! Nur per tiaj vortoj E-o povas akiri vivantecon plenan ! Kaj la genia sistemo de E-o ebligas tiun vivecon. Ekzemple, kiel traduki la sukajn "je m'en fous" "va te faire foutre" kotopo ? Ni uzu la aglutinan karakteron de E-o, kie la vortoj amoras unu la alian por naski viglan novan vorton eble uzitan momentete sed trafe ! La granda leĝo de E-o estas: ne valoras tro logike peni, lasu agi la analogion.

Vi jam bone konas la vortojn "krucumita", "ŝtonumita"



"ŝtiparumita", en kiuj "ita" montras pasivecon kaj "um" entenas ideon pri certa ago per kruco aŭ ŝtonoj aŭ ŝtiparo. Do nun vi bone komprenas :

"ĉurumita" "merdumito" "kacumito"

Ja : "Nenio ĉurinda en via prelego!

"Kion vi ĉuras ĉi tie ?
"Mi ĉuras pri tio
"Ĉu vere vi priĉuras tion?

kaj vi, ja vi! ĉu vi ne estas bele ĉurita virino ? En tiu "ito", ĉu vi sentas la humiligan sencon en "fikito" "bugrito" "merdito" "kokrito" "ĉurito" "kakito" "kastrito" ?
ĉu mi devas aldoni "deputito" ?

Ĉu vi ne sentas tion ?
Ĉu vi vin melkas pri tio ? Vi primelkas tion!

Do vi fekigas min ! Kaj bordel' de putin' de Dio, ĉu vi ne komprenas min ? Ĉu vi ne deziras uzi lingvon fluan, vivan ? Eble vi fajfas pri tio ! Sed fulmotondro ! mi tute konscie perfortis la lingvon, ĉar mi deziras fiki Esperante kaj ne merdi en iu kota movado. Jes ja, bone konsiderante la problemon, mi deklaras, ke la eternaj komencantoj, tiuj iammilernos-uloj, estas granda gajno por la E-a movado. Ili tiel naŭziĝis pri E-o, ke mi povas esti certa, ke ne estas danĝero, ke iu alia internacia lingvo povos varbi ilin. Sed ke la timantoj pri la tabuaj vortoj, kiuj estas fakte la kreaj fortoj de la lingvo, jes, ke tiuj timantoj ne uzu ilin, ke ili restu kun sia logika E-o, kun la interna ideo, sed ke ili ne riproĉu, ke E-o ne pli vive vigle vivas, ke ili uzu artefaritan lingvon, frostigan kodon, institucian lingvaĵon, robotajn kliŝ-klaĉojn en siaj fermitaj Fundamentaj sektoj sen feko kaj fiko, sed nur kun fido al la fina venko. Ho jes, kun tia E-o neniu espero, sed kun la feka-fika E-o eblas iu eta espero !

*

Do nun fino de la oficiala parto de mia prelego kaj ek al la neoficiala ! Ja mi kuraĝas proponi multajn novismojn por trafe, suke, alfaŭki iun aŭ ion, por vere, verve, krude elesprimi la nedecon, la fikon kaj la fekon. Ĉar vi certe konas la nepran leĝon de ĉiuj lingvoj : ju pli ofte oni uzas vorton, bildon, figuran sencon, des pli tiu vorto, bildo, metaforo perdas sian elvokivecon, sian plensukan kaj sukplenan forton, potencon. Do nepras la ekzisto de multaj sinonimoj por la triviala lingvo kaj mi kaj vi ĉiuj povas, devas krei tiujn novajn vortojn aŭ esprimojn ; kelkaj el ili tuj mortos, aliaj vivos, jen ja la leĝo pri ĉiu vivantaĵo kaj E-o estas

vivantaĵo. Ĝi ne estas mortinta lingvo, ne devus esti mortanta kaj eĉ pli mortonta.

Nu! Jen kelkaj novismoj (plejparte el akademiano Karolo Piĉ : lia nomo jam elvokas multon, ĉu ne ?)

ĉiĉ ! : interjekcio uzata por alvoki katinon.
ĉiĉo estas katino sed metafore ankaŭ virino kaj plej ofte la virina vulvo mem ;
sekve : "ĉiĉeto, ĉiĉino, ĉiĉineto"

kundo estas piĉo do sekve :
"kundino" "kundineto" "kundadi" "kundoleko".

Pri metaforaj bildoj : en ia pozicio ĉu mi ne kisas, lipumas la dulipon, la tulipon, kie elstaras la pistilo, la ina bubeto, la tiklilo, la amileto, kotopo. Kaj pro la sala gusto ĉu mi ne povas imagi pri aperta, malfermita mitulo, ĉu ne, mia mitulineto ? Sed ve, ĉu restas guteto da piso, aĥ tio malplaĉas, da pipiseto jen pli aminda vorto ; kaj mia pisilo kial do ne la pino, ĉiamverda arbo ĉiam erektiĝanta ĉiusezone, la arbo kun konusforma frukto iomete balano. Kaj denove la analogio, la vera logiko de E-o... Ekzistas sufikso por la femaloj "in", kial do ne por la maskloj "iĉ" ? Tiu pere de la ekvacio

in = nj      iĉ = ĉj

kaj do ŝerce dirite :
"Por iĉo valoras piĉo ; por ino valoras pino".

Jen nova vigla esperanta vorto kun triviala senco kaj ekde nun mi povas "pini" "pineti" (kun etaj pikpikoj, lantaj pafpafoj) "pinadi por geĝuigi" kaj vi ja vi naŭziga homo kial ne "pinaĉulo" kaj vi, kara amikino blekanta por esti pinumita...Sed ve ! kien pinumi ? Ĉu buŝen, ĉu piĉen kaj la tria truo ? ĉu postaĵen - iom plumba, peza ! - ĉu sidvangen ? - stranga! Necesas vere vorto por tiu truo tra kiu blovas la "facila vento" kaj denove mi enmerdiĝas, kiel nomi tiun blovon, tiun agon, ja vere ekzistas "furzi" tre triviala sed milde kiel nomi tiun venteton jen siblantan, jen muĝantan, jen tondrantan sed tiel naturan? Ekzistas ja esperanta vorto : "puo" kaj do "pui, pueti, puaĉi, tondrpui kotopo..."

Sed pri la putruo, kiel nomi ĝin aliel ol anuso ? Kiel la denaskaj beboj esperantistaj parolas inter si pri tio ? Ĉar tiuj fekvortoj estas la vortoj de la infanoj, estas iliaj unuaj spertoj pri la naturaj, biologiaj aferoj tuj kastritaj pere de la familio, tuj tabuitaj pere de la socio.

Kiel niaj denaskaj idoj povas kanti
"le trou du cul du chat" (la kata anustruo) ?
Ĉu vi memoras vian karan infanecon ?



Por sidvango, postaĵo ekzistas de longa tempo bela vorto, kiu estas "pugo". Belpugulino : tre ŝatinda vorto. Kaj vi ? Kia pugo, mia kara ! Tre poetika, ne familiara ! Do mi povas krei, pere de la sama maniero, kiun mi uzis por mia "ĉop", la vorton "gupo". Tiam : kongreso de "engupitaj", ĉu ne bone ? Sed mi preferas alian solvon : kunfandiĝo de du vortoj por krei novan, do

"truo plus anuso egal truso"

Vi povas evidente trovi aliajn kaj vi nepre devas elkovi tiujn.

De nun mi ne emus esti "entrusita" sed mi volonte dirus al iu, kiun mi malamegas : "entrusito" "trusito" "trusumito" "trusaĉulo" kaj mi certe dirus al iu teda : "kaj mian truson!" kaj miaj gefiloj povos kanti

"je la truso de l' kato"

Tamen sufiĉas mia vortdiboĉo, fi-ŝprucado, aĉ-verŝado, fuŝ-sputo. Mi ne plu volas frakasi ciajn cerbujon kaj cerbon, detrui (kaj denove ĉiam fiki, trusi) vian etikon... ne fikon... piki viajn tabuojn kaj mi timas, ke vi senkacigos min - pardonu : senkapigos min, do sufiĉ! sat! - nu, dank!

**Michel Challulau**

(Senutila) aldono de la tajpanto : EsperEble, la sakram-antoj trovis en la ĉi-supra prelego multan kaj valoran materialon, utilan municion, uzeblan en cirkonstancoj, kiam endas laŭte kaj vigle esprimi, ke "plenplenas la pokal'" Kiuj neniam sakris (en esp-o), tiuj unuavice alpafu la sakriston... per plej maldecaj insultoj ! Jen ja por ili bona okazo fariĝi ano de la tuta sakrist...io! Kiuj profitos de la okazo por malkuraĝe malaboni, al tiuj oni povas nur rimarkigi, ke ili ĝis tiam ne bone komprenis la ĉefan karakterizon de "Laŭte!" nome, ebligi ĉies esprimon sen cenzuro. Libero foje povas fariĝi danĝera... Jes ja, sed mallibero supozeble ankoraŭ pli, ĉu ne ? Kribo.

****************************************************

Solvo de la krucvortenigmo de n° 60 :

**Hor.** : 1. MARSELJEZO. 2. ANE. NIA. ON. 3. SEP. PORT. 4. AMELU. ALGO. 5. ŜIR. NEIG. 6. TRICIO. 7. UEA. NN. 8. EVA. SI. PIE. 9. CERUMENO. 10. ONOMATOPEO.
**Ver.** : 1. MASAŜUSECO. 2. ANEMI. VEN. 3. REPERTUAR. 4. RE. UM. 5. ENTUZIASMA. 6. LI. IET. 7. JAPANIN. NO. 8. OLEO. POP. 9. ZORGI. NI. 10. ONTOGENEZO

---

**venonta numero - ĉu ŝame dika ? - aperos en septembro**

---

# LA PACISTOJ KONTRAŬ PACO ?

En Okcidento, la pacista movado, prave aŭ ne, estas konsiderata kiel manipulata de Moskvo, aŭ almenaŭ utila al Sovetunio pere de siaj sloganoj...
Se, en esperantistaj medioj, oni multe parolis kaj propagandis pri paco kaj pacismo, malofte oni debatis tiun punkton. Ĉu ĝenerala akordiĝo okazas ?
La legado de la libro verkita de Vladimir Bukovski ebligas starigi sur interesaj bazoj debaton.

Bukovski, soveta opoziciulo (loĝanta en Okcidento post sia liberiĝo en 1977), skribis antaŭ 3 jaroj drastan pamfleton **La pacistoj kontraŭ paco**, kiu celas kian danĝeron kontraŭ Okcidento reprezentas pacista movado manipulata de Sovetio.

## SOVETUNIO PACISTA LANDO DE... 1917

La aŭtoro opinias, ke tiu pacista strategio naskiĝis samtempe kiel la kreado de la soveta reĝimo ; ĝi konsistas el "pacema" parolado kaj militista praktikado. Jam en 1917, Lenin kun la bolŝevistoj lerte uzis la pacistajn sentojn de la rusa popolo, kiu forte deziris la finon de la milito (Brest-Litovsk-pakto). Tamen, la soveta regado (Lenin kaj poste Stalin) ebligis interne kruelan kaj longtempan militon, kiu mortigis 20 milionojn da homoj : malsatego de la rusa kamparanaro por detruigi ĝian politikan opozicion ; invado al Ukrajnio kaj Kaŭkazaj respublikoj (1920), etnomortigo de diversaj minoritatoj (Ukrajnoj, Tataroj, muzulmanaj etnoj) ; sistema subpremado al la politikaj opoziciuloj (de la ribelo de Kronŝtad en 1921 ĝis la gulag-kampoj).
En 1939, Stalin konscias pri militista malfruo de Sovetunio kaj tial ne hezitas subskribi pakton kun nazia Germanio. Okaze de tiu evento, naskiĝas pacista propagando de Sovetunio. Laŭ la direktivoj de la Komintern (Internacio komunista) la komunistoj tutmonde denuncas senĉese la imperiistan militon gvidatan de Britio kaj Francio kaj male indulgas Hitler.
Tiu sinteno trankvile daŭros ĝis la 22a de junio 1941, dato de la germana invado al Rusio. Tiam, ĉio ŝanĝiĝas ; la mortigota malamiko iĝas Germanio kaj la imperiistaj landoj, aliancanoj.
De tiuj jaroj, tia propagando fakte ne vere evoluis ; tiu sinteno pri paco kaj milito resume estas jena : estas "justaj" militoj tiuj, kiuj favoras Sovetunion, kaj maljustaj tiuj, kiuj





Viatcheslav Syssoiev

malfavoras ĝin.

**50aj JAROJ : "Forĵetu ni al mar' usonajn armeajn bazojn..."**

Post la fino de la dua mondmilito, estas grava la soveta malfruo en la vet-armado kun Usono. Sovetunio do instigas pacistan agadon, dekoracian en Orienta Eŭropo kaj ĉefe en Okcidento, dank'al la efika strukturo de la komunistaj partioj.
Sed meze de la 50aj jaroj la movado ne plu utilas por Sovetunio, ĉar la rilatoj kun Usono politike kaj militiste ŝanĝiĝas : kreado de sovetaj bomboj, morto de Stalin kaj oficialigo de la "malstreĉeco", kies apoteozo estas la kontrakto SALT 1, kiu sankcias nuklean egalecon inter la du potencegoj, la pacista aktivado jam de longe estas interrompita.

**La 80aj JAROJ : la pacistoj haltas ĉe la berlina muro**

La dua pacista ondo, kiun ni nuntempe konas, koincidas kun la eta malvarma milito (afero de la Pershing II -rakedoj, invado al Afganio).

Bukovski analizas konkrete la nuntempan pacistan movadon kaj li indikas faktojn, nombrojn, tekstojn, kiuj pruvas, ke manipulado de tiu movado estas ne mita sed reala. Por tiu aspekto la legado de tiu libro estas por ĉiuj ege ege instruiva!
Sed bedaŭrinde, la analizo de la pacista movado en si mem estas malpli objektiva kaj tre diskutebla. Se la aŭtoro konsentas, ke nur malgranda sektoro - ĉefe gvidantoj - estas manipulata, li ne indulgas la aliajn aktivulojn.
Li prave konstatas, ke estas multaj oportunistoj politikaj (ekz. la urbestro de Sarrebruck LaFontaine en F.R.G.) aŭ religiaj (la Protestantaj eklezioj, ĉefe en FRG kaj en Nederlando), kiuj trovis bonan rimedon por popularigo aŭ reklamo. Sed malprave li ĵetas ĉiujn en la saman sakon ; notinde, la amason da gejunuloj sinceraj sed naivaj - la "utilaj stultuloj" laŭ la leninista vortaro.
Tie, Bukovski duoble eraras ; unue, li ne citas la sendependan pacistan movadon en Orienta Eŭropo kaj due, parto de la

movado en Okcidento efike propagandas por paco kontraŭ Pershing II kaj SS 20, subtenante la orientajn pacistojn (ekz. en Francio CODENE).

Tamen, tiu libro enhavas pli profundajn argumentojn ol tiuj ĉi, kiuj ebligas difini ĝeneralan pacistan agadon por nuntempo kaj estonteco.

## KIEL PAC-AGADI ESTONTECE

Laŭ Bukovski, malarmado estas utopio nerealigebla, ĉar Sovetunio ne estas komparebla al Usono. Usona imperiismo ege pli kompleksa baziĝas ĉefe sur sia ekonomia potenco (notinde, nuntempe la dolaro). La soveta reĝimo baziĝas sur agresema kaj militista politiko ; laŭ tiu aspekto ĝi similas pli al romana imperio ol Usono. La soveta estraro timas ne pri Okcidento sed pri sia propra loĝantaro : ĉiu malsukceso en la disvastigo pruvus malfortecon kaj okazigus certe internajn resonojn kaj eble finon de tiu reĝimo. Do, atingi tutmondan pacon pere de la militista rimedo tute maleblas. La sola rimedo estas politika : klopodi, ke Sovetunio demokratiiĝu - la polaj eventoj aliaspekte konfirmas tiun analizon.

Tiel, tiu pacista taktiko ĉiam fiaskos ; kaj same okcidenta vetarmado. Malbona solvo estas amasigi bombojn kaj rakedojn por lukti kontraŭ Sovetunio. Konkrete, necesas ĉesigi ekonomian helpon al la orienteŭropaj landoj, kiu ebligas al tiuj reĝimoj pli bone regi sian loĝantaron. Sed bankistoj kaj kapitalistoj - industriaj kaj terkulturaj - nuntempe malkonsentas tion, ĉar ili ne deziras perdi parton el sia profito.

Nenia espero flanke de la ŝtatoj ĉu okcidentaj ĉu komunistaj. La pacista movado nepre luktu kontraŭ ambaŭ blokojn kaj konstituu veran popolan movadon. Tiamaniere, la sinceraj okcidentaj pacistoj ne plu povas konsenti, ke orientaj pacistoj estas subpremataj kaj malliberigataj!

**Michel BAURET**

Venonta artikolo : Pacismo en Orienta Eŭropo : de la berlina muro ĝis Varsovio

### KELKAJ KRONOLOGIAJ INDIKILOJ

1917. bolŝevisma revolucio en Rusio.
1918. Brest-Litovsk traktato. Paco inter bolŝevistoj kaj Germanio. Sovetunio ne plu partoprenas en la milito.
1939. german-soveta pakto.
1941. germana atako kontraŭ Sovetio.
1945. eksplodo de la unua atombombo (Usona) en Hiroshima.
1947. komenco de la "malvarma milito"
1948. kreado de la Pac-Movado en Wroclaw (polio)
1949. Eksplodo de la unua atombombo soveta.
1950. Alvoko de Stokholmo kontraŭ la atomarmiloj.
1952. Unua termonuklea bombo usona.

(fino sur p. 13)





# VORTOJ DE MALJUNULO...

valo

## ... kaj de ekonomia herezulo.

*En 1985 mi atingas 20 jarojn da emeriteco post 42 jaroj da profesia aktiveco.*

*La pensioj de la emeritoj estas financataj per la kotizoj de la aktivaj salajruloj kaj de ties mastroj.*

*Pro la meza plilongiĝo de la homa vivo kaj la pli frua emeritiĝo, la emeritoj daŭre plimultiĝas. Pro la kreskanta senlaboreco, la kotizantoj daŭre plimalmultiĝas. Oni povas antaŭvidi tempon, kiam okazos malekvilibro inter la kotizoj kaj la pensioj. Tio estas unu el la konsekvencoj de la nuna ekonomia krizo.*

*Laŭ la ortodoksaj ekonomiistoj, ĝi estas "cikla krizo" kiel la antaŭaj, kiujn sekvis periodoj de prospero. La nuna rea starto de la industria produktado kaj regreso de la senlaboreco en Usono ŝajnas pravigi tiun opinion. Laŭ pli pesimistaj observantoj, tiuj signoj de reboniĝo estas efemeraj, kaj la krizo estas daŭrema kaj neinversigebla fenomeno, ligita kun la nehaltigebla progreso de robotiko kaj informadiko. Ĝi estas la granda anstataŭigo de la homoj per la maŝinoj, anoncita de Jacques Duboin antaŭ duonjarcento.*

(fino p. 14)

(fino de p. 12)

1953. Unua termonuklea bombo soveta (Sovetio kuratingas Usonon)
- morto de Stalin
- Krutĉev, nova estro de Sovetio
1972. Akordiĝo SALT1 Nixon/Breĵnev
1977. Komenco de la instalado de SS20 en Sovetunio.
1979. NATO decidas principon pri instalado de Pershing II.
1980. Soveta invado en Afganion. Komenco de la "eta malvarma milito".

*Al tiu grava problemo unu sola solvo, al tiu plago unu sola kuracrimedo : malpliigi la semajnajn laborhorojn, por havigi al ĉiu laboron, kaj ne malaltigi la salajrojn, sed male ilin plialtigi, por ke la amase produktataj varoj estu aĉeteblaj. Per aliaj vortoj : pagi la laboristojn, ne por ke ili produktu, sed por ke ili konsumu.*

*Bedaŭrinde, tio ne estas aplikebla naciskale : ja se iu nacio ĝin adoptus, ĝi estus baldaŭ sufokita per la konkurenco sur la internacia merkato. Tiel longe, kiel ekzistos sendependaj suverenaj nacioj, regos inter ili tiu senkompata konkurenco. En tiu ekonomia milito venkos la plej fortaj, t.e. la plej efike organizitaj laŭ la kapitalista ekspluatado de la laboro.*

*Por ĉesigi tiun militon, necesus starigi tutmondan sennacian organizon, kun unu sola mono. Kaj tiu unika mono devus esti ne riĉaĵo en si mem kun propra valoro produktanta interezon, ne fonto de profito, sed nur signo por akiri la konsumaĵojn - efemera signo, kiu perdus sian tutan aĉetpovon post difinita tempo. Tia estas la "distribua ekonomio" iam skizita de Duboin kaj Bellamy. Tiel, kaj nur tiel, efektiviĝus la slogano ne nur de la anarkistaj teoriistoj, sed ankaŭ de Karlo Marks mem : doni al ĉiu ne laŭ lia kapablo, sed laŭ liaj bezonoj**

*Ĉu utopio ? Sed kiu alia solvo estas imagebla ?*

** Marks kaj Engels - La Germana Ideologio 1845-1846*

********************************************************

## FRIPONAĴO DE TRIBUNALA RESPONDECULO

Estante dum pluraj jaroj en granda fabriko kiel teknikisto, iun tagon mi troviĝis en malagrabla situacio : La "Ŝtato" ne plu volis atendi sian impost-krediton kaj iu aroga impost-oficisto, por montri sian altan "povon", ordonis la fermon kaj likvidadon de tiu fabriko pere de la Tribunalo.

La Tribunalo elektis sian friponulon por la dissolvado de la afero. Kaj tiu friponulo por profiti de la afero plilongigis la definitivan kalkulon, vendante iun ne valoran dometon por deksep jara kredito. Tiamaniere li dum 17 jaroj havis la rajton forŝovi ĉiun pagon, gajnante - laŭ sia plano - grandegan monsumon.

Dum mi, kiu rajtis ricevi monon (pro mia foriro) kaj aliaj en samaj cirkonstancoj, pro la prokrasto de la pago, ne nur ne ricevis renton, sed ankaŭ, pro la inflacio, perdis grandegan monsumon.

-nn-



*Nia novelo :* **Hagen Hirte**

## SEN LABORO

*La ĉielo brilegas kaj alte staras fajnliniaj cirusoj. Sub la cirusoj bluas la vasta lago. Ne tiel forte, ne tiel poŝtkartece kiel la ĉielo, sed iom, iom ja. Sur la sablostrando kaj enakve tumultas svarmoj de homoj, kriĝoje petolas infanoj. En la korbosidejoj oni ŝvitas, legas, ĝemas. Estas ja egale. Oni estas fore de ĉiu ajn laboro. Nur ne pensi pri laboro. Tute kaj tute ne pensi pri io ajn !*

*Remboatoj naĝas sur la lago. Aermatracoj kaj fieraj velŝipoj naĝas tie, kaj la motorboato de la savostacio. Flavaj interligitaj balonoj limigas rektangule la malvastan areon, kie la ripozuloj sin banas. Avertas laŭaj ŝildoj, ke translima naĝado okazas je propra respondeco. Kelkaj lertuloj tamen moviĝas ekstere de la flava streko. Transe de la lago etendiĝas iuj arboj, formantaj dikan verdan bendon laŭ la tuta alia flanko. La homoj tie vidiĝas kvazaŭ formikoj, ĉar estas longa distanco ĝis tie.*

*Juna paro transen rigardas al la formikecaj punktoj. Malantaŭ la paro, post la strando kaj supren post la deklivo, staras distre tendoj kaj bangaloj sur longa ebeno. Proksime al la strando troviĝas gastejo kun vasta teraso, kaj maldekstre de la teraso tendokinejo, kaj apud la kinejo malantaŭ arbareto lago por nudbanuloj.*

*La juna paro kisas sin ĝue inter la infanoj. Ŝi tiras lin al si. Ili kunfluas, interplektiĝas, formas unu korpon, disfluas, ree unukorpiĝas. Ŝajne estas bela ludo. Kaj tiam ili denove rigardas al la formikoj.*

*"Estas granda distanco, ĉu ne, Jan?" diras la damo.*

*"Jes, ege granda, sed alloga. Ĉu tie eble situas la paradizo? Ĝi ĉiam situas malproksime, ĉiam sur la alia flanko, ĉu, Manja ?"*

*"La paradizo estas apud mi, Jan".*

*"Apud vi, kiel ?"*

*"Mia paradizo estas vi."*

*"Mi tre dankas, saĝa feino, sed tamen nur estas belaj vortoj. La paradizo estas tie, kie mi ricevos laboron, kaj ne nur ian, sed iun al mi konvenan."*

*"Ne parolu tiel. Ni volis ferii ĉi tie sen cerbumi pri tiaĵoj. Forgesu tion almenaŭ dum la forpermesaj tagoj!" ŝi diris okulflate.*

*"Bone, bone, se mi nur povus. Banditoj glatvizaĝaj! Ili lasas fridasange mortaĉi min ! Mi perlaboras eĉ ne unu modestan groŝon, sed ili diras gajmiene al mi : 'Ne ekzistas ja senlaboreco'. Ĉu vi komprenas tion ? Ĉu vi komprenas tian ĉielkrian malicon ? Ne ekzistas ja senlaboreco. Fino kaj punkto." Malamo flagris subite en la vizaĝo de Jan.*
*"Jan, mi petas vin, mi ja ne kulpas tion, aŭ... ?"*
*"Vere, vere, vi ne kulpas tion, anĝelo mia, vi nur ridetas kaj mi estas savita, ĉu tiel ?"*
*"Ne tiel, sed iom tiel. Prefere kisu min. Anstataŭ krioj, kisoj, ĉu ne revolucia programo ?"*
*"Nu, certe simpatia programo."*
*Ili denove kuniĝis, disfluis kaj unukorpiĝis. Tre verŝajne estas ne nur bela sed ankaŭ necesa afero.*
*Iom poste ili suprengrimpis laŭ la ŝtonriĉa pado sur la deklivo, sidiĝis ĉe blanka tablo en la gasteja teraso kaj ĉirkaŭrigardis. Estas multe pli interese ĉi tie ol en ĉiu teatro. La teraso estas inundita de bunte kirliĝanta homamaso. La tri giĉetoj antaŭe tute ne sufiĉas por la atakantaj trink- kaj manĝemuloj. La vendistoj ŝvitas kaj la vicoj grumblas. La malfortuloj rezignas kaj la aliaj tuj postŝoviĝas. Ek, al la atako! Obstine antaŭen, tiam vi venkos. Tio estas la sankta batalo por vivo trans la nuno. Nur rekte, kuraĝe kaj la okazon kaptante ! Flanken gravedulino ! Hop, avineto !*
*Dekstre antaŭe muziktrio superŝutas la kirlamason per la muziksensacioj el la pasinta jaro. Sufiĉe laŭte ili turmentas la instrumentojn. Oni ne povas nei tion. La gitaristo ŝajne ne regas pli ol tri akordojn kaj la frapinstrumentisto kopiadas monotone la homan korritmon. La basisto kantas ne malbone, se oni ankaŭ atentas pri tio, en kia stato li trilas. Manja kisas Janon. Kaj Jan kisas Manjon. Kaj tiam ili kreve ekridas, ĉar eksonas kanto tre ŝatata de ambaŭ. La basisto mielas pri renkonto de viro al virino, kiu estis neatingebla diino por li, en fora lerneja tempo...*

*He, pardonu, mi vin konas,*
*vi la bela estas,*
*kiu ravis per bluĵinzoj min.*

*He, pardonu, mi vin konas,*
*mi dum noktoj ja ne dormis,*
*nur ĉar mi unufoje vidis vin.*

*"Ili postludas ĝin preskaŭ perfekte. Ĉu ne, Manja ?"*
*"Jes, ŝajne ankaŭ al ili plaĉas. Alportu bieron, kara mia."*
*"Bieron grandan aŭ mal...?"*



*"Mal... se mi rajtas peti."*
*Jan eniĝis malinkline la vicon. Kiu sin enjungas, devas tiri, li pensis. Li ŝvitis, puŝis, ŝovis, grumblis, atakis, atingis la celon en gloro kaj revenis kun la bieroj. Iu ŝanceliĝanta drinkulo danĝere alproksimiĝas, kliniĝas minace super la tablo kaj demandas per peza lango "Ĉu vi havas... ĉu vi ne hava... bieron?"*
*"Ni ne havava, foriĝu", diras Jan, forŝovante la aĉulon. "Ne hahvava, pah!", tiu respondas mergiĝonte en la ĉirkaŭstarantoj.*
*Senvorte la paro eltrinkis kaj tiam promenis al la tendokinejo por informiĝi pri la programo. Estas la kutima. Filmoj servas ja hodiaŭ unuavice kiel rimedo por rekompensi la laborantajn homojn por tio, ke ili en la ĉiutaga vivo kutime nur rajtas maŝinece funkcii kiel viglaj dentradoj en la laŭdata moderna industrio. La programo verŝajne ne eblus sen usonanaj skandalfilmoj el la fabriko Hollywood. Pro tio do posttagmeze skandalfilmo usonana. Fruvespere skandalfilmo usonana. Kaj malfrue vespere skandalfilmo usonana. Tiom da skandaloj en unu kinejo, Jan pensis. Sed ne, la lasta estas dana. Sur la filmprogramo fiermienas sinjoro kun rigida rondĉapelo. Inter la lipoj li cirkligas ekscitite cigaron. Malantaŭ li ĝuste fermiĝas prizona ferpordego. Mansalutas al li du komikegaj uloj. Unu estas nervoza dikulo, kaj la alia ŝajnas videble tro longa por sia pantalono. Do, Egon Olsen kaj liaj komplicoj.*
*Manja demandas : "Ĉu ni eniru, bela knabo ? Estas io por ridi kaj rido sanigas, ĉu ne ?"*
*Jan trovas idiota eniri filmon por povi ridi. Li ne emas eĉ iomete al rido. Li ne povas forigi tiun malklaran senton, ree kaj ree skuantan lin. Ja ne ekzistas senlaboreco, zigzagas en lia kapo. Kio ? Vi ne havas laboron ? Tio ja ne povas esti. Penu iom ! Penu iom ! Li neniel povas imagi kiel plu : Kiel plu ?*
*Ni ne estas pli bonaj ol la geaktoroj, pensas Jan. Ni sentas timon, sed anstataŭ batali kontraŭ ĝi, ni iras en kinejon. Ni tre bone scias, ke ili tie traktas nin idiotoj, ke oni dronigas nin en iluzioj, sed ni eniras, ni akceptas la iluzian maŝinon. Ni eĉ krias pro la plej bonaj lokoj. Jan nur diras : "Bone, aĉetu la biletojn!"*
*Post la amuzo ili amblas laŭ la strando en la direkto al la luita bangalo. La nokto mallevigas siajn nigrajn fingrojn super ĉio, kaj la junuloj de la savogrupo sidas ĉirkaŭ fajro apud la turo. Iu ludas sur la gitaro "Get out of my cloud" kaj "Lady Jane" kaj aliajn popklasikaĵojn. Tio estis antaŭ mil jaroj, pensas Jan. Manja volonte sidiĝus ĉe ili, sed Jan tiris ŝin kun si en la bangalon.*

*Tuj Manja manipulas en la kuireja angulo por prepari iujn bongustaĵojn, kiel ŝi diras varmtone al li. Jan sekrete admiras la energion de sia edzino. De kie ŝi prenas la forton ?*
*Jan kuŝigas sin kaj observas la savoteamon tra la fenestro. La timo denove embuskas, preskaŭ mankaptebla ĝi ŝajnas. Ho, dio en la alto ! Kial ? Kial ? Kial mi kondutas kiel vundita besto ? Ho, forgesu. Kiel forgesi la kruelon de tiuj, kiuj havas laboron ? Kiel, vi ne havas laboron. Tio ja ne povas esti. Penu iom, amiketo. Ĉu vi eble pensas, ke ili portos la laboron en vian hejmon ?*
*Dum ili manĝas, venas konatino de Manja al la tablo antaŭ la bangalo. Ŝi estas ege bonhumora kaj babiladas kiel akvofalo. Nur se ili dumsekunde rigardas al Jan, ŝia vortofluo iom bremsiĝas. Do, ankaŭ ŝi ne vere bonhumoras. Ankaŭ ŝi videble timas ion. Kion ? Ĉu mi havas pestbacilojn ? pensas Jan. Li retiriĝas kaj legas pri Giordano Bruno, pri Hegel ktp. Jan havas filozofian periodon. Tiam li denove profundiĝas en la lernolibron por internacia lingvo. Freneza, sed imprese logika lingvo, li pensas. Esperanto. Nu, sonas iom hispane. Jan baldaŭ laciĝas. Parte pro la enhavo - iu sencerba familio promenas etburĝe laŭdante la avantaĝojn de Esperanto tra Prago - kaj parte pro tio, ke li ne scias por kio ? Por kio Esperanto, se la homoj eĉ en unu nacio ne komprenas sin reciproke ? Iam la akvofalo finfine haltas. La konatino volas adiaŭi. Manja signalas sekrete al Jan, ke ankaŭ ŝi pri tio sufiĉe kontentas. Intencante iri, la damo ankoraŭ memoras pri afero ĝis nun ne dirita : "Ha jes, preskaŭ mi forgesis. Ankaŭ Peĉjo kaj Ninjo estas en la tendaro."*
*"Kiu ? Petro, la magiisto!" ekkriis Jan.*
*"Jes, li kaj Nina, nur cent paŝojn de ĉi tie."*
*"Se vi volas, mi montros al vi..."*
*"Bone", diris Manja, "nu, rapide, ni iru do."*
*Ili ekmarŝis. Jan tre ĝojis. "Imagu al vi, Manja, la magiisto! Kiom longe mi ne vidis lin." La akvofalo denove funkciis, sed fine antaŭ la bangalo de Petro kaj Nina ĉesis. La konatino montris al la lumigata fenestro kaj nun efektive adiaŭis. Jan kaj Manja frapegis la pordon kaj tuj elgapis blonda fortegulo.*
*"Hoho, Jan kaj edzino, estas eble ?", li ekkriis, "envenu gesinjoroj!"*
*"Kie estas Ninjo ?"*
*"Interne, rapide enbangaliĝu" basvoĉis ridete la giganto. Ĉio ekis grandioza. Jan ĝojegis. Ili interkisiĝis tiom sincerege kiel alikaze decus nur por grandaj ŝtatestroj en socialistaj landoj.*



*Ili brakumis kaj falis ride sur la faldoseĝojn. Ninjo surtabligis vinon por la inoj kaj brandon por la sinjoroj. Oni je-via-sanis. Tiam oni je-amikeco-sanis. Kaj tiam oni je-tendaro-sanis. Kaj nur tiam ili iom trankviliĝis.*
*"Kiel vi fartas, Ninjo ?" demandis nun Manja.*
*"Bone, tre bone, Manja. Peĉjo laboras kiel masonisto. Li estas brigadestro. Li bone perlaboras kaj ni vivas kune ĉe miaj gepatroj en la muelejo. Vi ja scias. La muelejo estas tre granda. Ni ne havas kaŭzon transloĝiĝi. Kaj vi ?"*
*"Nu... he...kion vi faras mem, Ninjo ?"*
*"Mi laboras kiel inĝenierino en la urbo, Manja. Tute kiel mi celis dum la studado. Sed diru nun, Manja, kiel fartas vi?"*
*"Por diri la veron, Jan ne havas laboron. Vi ja eble scias. Li estas ia spiteulo. Li forlasis la lastan laboron, kaj nun ne povas trovi novan. Ĉu ne tiel, Jan ?"*
*"Jes, tiel."*
*"Kial vi ne havas laboron, Jan, tio ja ne povas esti. Senlaboreco ne ekzistas en nia ŝtato, ĉu ne?" diris Petro.*
*"Ne ekzistas, ne ekzistas. Sed tamen ekzistas ! Duona jaro sen laboro, amiko... kaj tiukaze senlaboreco ne ekzistas, ĉu ?"*
*"Ĉu eble havas politikan kaŭzon ?"*
*"Ne, mi ne provis ĵeti bombon aŭ ion tian. Mi provis eĉ ne ion. Mi nur forlasis tiel nomatan bonan postenon sen indiko de kaŭzoj."*
*"Azeno vi estas, Jan" diris nun senkomprene Nina.*
*"Jes, mi scias, sed kion fari ? Mi estas azeno, jes."*
*"Jes, tion oni ne faru", nun ankaŭ Petro emfazis, "tion scias hodiaŭ ĉiu ajn, ke oni ne tiel faru."*
*"Nu mi ne sciis, pardonu, Peĉjo."*
*La parolado transiris rapide al neatendite frosta situacio. Montriĝis bedaŭrinde, ke Nina kaj Petro intertempe transformiĝis al tiu homa speco, kiu scias ĉion pli bone. Anstataŭ nur iomete provi iel helpi, ili krude riproĉis. Nu, ne estas tute ekzakte. Nina riproĉis kaj Petro drinkis. Manja volis savi la situacion. Sed tio ne povis sukcesi. La bonstata Nina ne volis kompreni la malagrablan paron. Petro diris nenion. Ĉio iĝis senespera. Tiel iras la aferoj de tempo al tempo. Antaŭ minutoj ili ankoraŭ ĝojis pri la hazarda renkonto. Kaj nun ? Nun ni estas preskaŭ malamikoj, pensis Jan. Ankaŭ li nun silentas. Li observas Ninjon. Jes, ankaŭ Ninjo timas. Kial ankaŭ ŝi ? Li observas Peĉjon. Peĉjo almenaŭ ne timas. Li drinkas. Estas sensence plu alparoli lin. Li gapas al la brandobotelo kaj Nina enverŝas por li.*

*Jan rememoras pri longe pasintaj tempoj. Ekzemple tion : Petro staras antaŭ la lerneja tabulo kaj klarigas al la matematikinstruisto kiel elegante solvi iun taskon. Kaj ekzemple jenon : Petro venkas kiel longdistanca kuranto en la lernejo. Kaj ekzemple : Petro parolas pri sia patro, kiu malsanegas. Li diras: 'Mi timas, ke li baldaŭ mortos. Li ne estas mia patro en biologia senco. Sed tamen, li estis ĉiam pli bona al mi ol iu ververa patro. Kaj mi havas nur lin.' Kaj ekzemple tion : Petro interesiĝas pri sociala justeco. Petro diras : 'Jan, kredu min, ni devas trahaki vojon al la suno. Kiel trahaki vojon por la homaro, se ni ne helpas ĉe tio ?'*
*Kaj tion : Petro kiel magiisto. Petro kolektas librojn pri magiarto. Petro eksperimentas pri propraj artifikaĵoj. Kaj tion : Petro brilas kiel plej bona lernanto en la lernejo. Kaj tion, kiam li diris : Ninjo volas tiri min pli proksime al ŝia familio, ĉar ili havas monon. Karulo mia, tio ne sukcesos. Kio estas mono ? Oni forĵetas ĝin. Oni tretadas sur ĝi. Oni sputas sur la monon. Mono ne havas animon, ĉu ne, Jan .'*
*Jan nun eĉ pli atente rigardas al Petro. Tio ne estas Petro, estas alia. Kaj li rigardas al Ninjo. Ninjo enverŝas por li. Jan nun demandas : "Ninjo, Peĉjo estis iam tre bona magiisto. Ĉu vi ankoraŭ scias tion ?"*
*"Jes, mi scias pri tio."*
*"Ĉu li ankoraŭ nun fojefoje magias ?"*
*"Kiel ? Ĉu Petro plu iluzias. Kompreneble ne, Jan, li ja ne plu estas infano."*

**LA KORVO KAJ LA VULPO** (El Ezopo reverkis Lina Gabrielli)

La korvo ŝtelis pecon da fromaĝo kaj flugis sur poplon por ĝin manĝi trankvile. Observis tion la vulpo kaj ŝi tuj ekflatis lin por gajni la fromaĝon.

- Ho, amiko, kiajn mirindajn flugilojn vi havas por atingi tiel facile la arbon !

La korvo silentis pro timo, ke la frandaĵo elfalu el la beko. La vulpo pensis, ke li ne bone aŭdis kaj pli forte kriis:

- Kiajn sveltajn piedojn vi havas, ne nur mirindajn flugilojn!

La korvo restis silenta. Sed la vulpo persistis :

- Mi supozas, ke ankaŭ via voĉo ornamas vin ! Ne povas esti alie por via nobla figuro en eleganta, nigra, sinjoreska vesto. Mi emus aŭdi ĝin, por ke mi estu certa, ke mi ĝuste divenis !

La korvo ne plu povis elteni. Li malfermis la bekon por aŭdigi sian kanton ; kaj la fromaĝo enfalis en la buŝon de la atendanta vulpo.



# Ĉies voĉo

## VIRINOJ KAJ ARMEOJ

(daŭrigo de L! 60)

En Svisio, ĉiu viro devige kunlaboras en la armeo. Ne estas civilserva ebleco por rifuzantoj : Ili estas krimuloj kaj devas iri al malliberejo por tempo inter 3 kaj 10 monatoj proksimume (de jaro al jaro, malliberiĝas tiamaniere 1000 svisoj). Armea servo daŭras unue 4 monatojn, poste, inter la aĝoj 21 kaj 50, ĉiujare 3 aŭ 2 semajnojn. Post la 50-a aĝjaro la svisa viro povas redoni la uniformon kaj armilon. (Eĉ la plejmulto de la sanitaristoj en la svisa armeo portas manpafilon).

Post la aĝjaro 50, viroj devige aniĝas al t.n. civilaj protektantoj. Civila protekto estas preskaŭ-militista organizo, kiu celas protekti homojn kaj forporti ekz. bombdetruitajn domojn. La organizo ankaŭ prizorgas la kelojn, en kiuj la registaro celas eĉ "ŝirmi la popolon kontraŭ atommilito".

Ĝis nun, por virinoj ne estas deviga militservo, virinoj libervole povas kunlabori en armeo aŭ civila protekto. En la jaro 1983 totalo de 27 000 virinoj estis en tiu "servo" (Viroj en armeo estas entute 600 000).

Jam de kvarona jarcento oni (= "la aliaj") laboradas en tiu ĉi lando, en la kadro de ĝenerala arme-igado de la socio, enkonduki pli ampleksan virinan (milit)servon. Kulmino en tiu evoluo estis en la jaro 1983 raporto de iu s-ino Weitzel, respondeculino de la tuta ina militistaro. La raporto enhavas jenajn proponojn :

- Deviga instruo por virinoj, kiuj ne jam estas anoj de iu libervola servo.
- Deviga servo por virinoj de diversaj profesioj, ekz. flegistinoj, instruistinoj, kampulinoj.
- Deviga instruo en ĉiuj lernejoj por (ambaŭseksaj) lernantoj pri konduto dum milito, flegado de vunditoj ktp.
- Ĝenerala deviga militservo por ĉiuj virinoj.
- Pliampleksigo de kursoj pri medicina ekhelpo.

La realigo de tiuj ĉi proponoj estas provata

laŭ diversaj manieroj. Unu el la provoj estas alparoli la virinojn ek de emocia flanko, dirante, ke estas ago de amo al proksimulo, flegi vunditojn kaj por la tuta lando estas grave kunlabori, laborante en municifarejo aŭ stirante aŭtegon. Jen vojo, kiun ili elektas, alparolante patrinojn de familioj kaj dommastrinojn.
Alia provo konsistas en jeno : Oni diras, ke militista kunlaboro estas ago de emancipiĝo kaj ke estus precize tio, por kiu virinoj jam de longe luktadis. La legant(IN)oj pripensu mem, ĉu vere estas emancipiĝo lerni kiel mortigi homojn ; demandu vin mem, kiu vere bezonus emancipiĝon !

Pli kaj pli la virinoj (ne nur en Svisio) konscias, ke ilia disponebleco kiel rezerva armeo kaj kiel helpantinoj de la militistaj organizoj jam estas tradicia : Jam de jarcentoj, virinoj estas nepre utilaj por la militiroj kaj defendadkonceptoj de la viroj - kiel flegistinoj, laboristinoj aŭ kiel patrinoj/edukistinoj de tutaj generacioj de soldatoj. Sen la kunlaboro de virinoj - sen iliaj servoj, ilia subteno morala aŭ ilia silento - ĉio ĉi ne estintus ebla.
Ne pro emo teni sin "ekstere" kaj lasi la virojn fari la militumon ili rifuzas la al ili proponatan rolon ; ilia emo estas kuraĝigi virojn, ke ili pripensu ĝisfunde sian rolon, kiu tute ne estas denaska.
Estus ankaŭ grave, pripensi kiuj formoj de perforto ekzistas, ke ne nur estas perforto, kiam iu mortpafas iun alian, sed estas perforto ankaŭ, kiam gehomoj mortiĝas pro malsato aŭ estas malprivilegiataj pro etna deveno aŭ pro sekso. Ĉu vere ni havas pacon ĉe ni, nuntempe, kiam oni ne aŭdas pafojn ?

**Sonja Julier, ueli haenni**

*Kiam mi legas la enkondukon de Suzanne, ŝajnas al mi, ke tiu debato jam okazis dum mia juneco. Sed... mi estas 60-jara! Jam de longe la armeo enŝoviĝas en la socion. Mi, pro mia vivodaŭro, rimarkas, ke ni fulmorapide progresas en teknikaj fakoj sed, laŭ iamaj priskriboj, ni restas mezepoke mensaj. Vi permesu nur du komparojn : pri la varbado por la mezepokaj krucaj militiroj kaj pri la varbado por la "interstela milito" Kio diferencas ? Cele al mezepokaj krucmilitiroj alparolis la homamasojn la pastroj kaj eklezianoj, senpere sur parolejo; nuntempe, pro la teknika progreso, alparolas la homamasojn fame konataj roluloj Yves Montand kaj Ronald Reagan. Kion oni diris dum la mezepoko ? Ke la tombo de Kristo estas en la posedo de nekredantoj. Do nepre necesis militi. Kion oni provas demonstri sur TV-ekrano hodiaŭ ? Ke sovetianoj intencas detrui nian civilizon (eĉ ili transpasis la landlimojn!). Do nepre necesas militi. Mi ja memoras, ke la nazioj okupintaj nian landon senĉese blekis kontraŭ la "flava danĝero". Dume ili murdis kaj rabis. Ĉu io de tiam ŝanĝiĝis? Jes, io ŝanĝiĝis : se ni ne kapablas mem regi nian estontecon, tiam ni iros al katastrofo pro gvidantoj, kiuj ne kapablas imagi alian vojon ol la militvojon. Tiel dependas de ni ĉiuj ĉu paco aŭ ĉu milito.*

*En tiu ĉi kunteksto kion faras la virinoj ? En 1914-18, virinoj laboris en la militfabrikoj por provizi la ĝeneralan buĉadon. Kiam mi militis, en 1944, la virinoj stiris la ambulancojn kaj transportis la vunditojn. Post la kontraŭhitlera milito multaj junuloj estas anoj de la pacmovado, kaj kune kun la virinoj ni supreniris milojn da ŝtupoj por peti la loĝantojn petsubskribi kontraŭ la atoma bombo, kiu ĵus detruis centmilojn da homoj en Japanio. Tio signifas, ke la sinteno de la virinoj respegulas la mensostaton de tuta popolo. Viroj ĉesu esti agresemaj, tiam ankaŭ virinoj turnos sin al pacaj verkoj.*

*Nun pri la naskostriko. Mi tute ne kredas, ke tiu elekto estas mem sufiĉa por decidi pri paco aŭ milito. Ĉiu virino rajtas naski aŭ ne infanojn. Tio estas alia debato. Sed vi konstatu, ke estus tre bedaŭre ne havi infanon pro la kretena paranojo de agresemuloj, kiuj ne rajtas paroli je la nomo de popoloj. La virinoj estas egalrajtaj kun viroj : ili luktu por la paco kaj ili konstruu mem la mondon deziratan. Sed se plaĉas al ili soldatiĝi, tiam mi konsilas al viroj, ke ili donu la tutan respondecon pri la organizado de la armeoj al virinoj : tiele pli koncizaj estos la konfliktoj.*

***G. MAZAUD***

**RIMARKIGOJ**

Naskostriko : "ne plu ekzistos la homaro", skribis Jakelino. Militi havas saman konsekvencon. Do, ĉu ne estus pli saĝe ŝpari ĉiujn penojn, kiujn nasko, vartado de la ido, ktp, postulas ? Evitigi al siaj idoj tian teruran travivaĵon, kiu ne estas natura. Neneadeble, ke virino vivis (as) en intimeco kun la feto ; pro tio, eble, pli altgrade, ŝi havas konscion pri la hororo, la frenezeco de tia buĉado, fare de mondregantoj kaj de la militistoj. Por ŝi, la uzotaj mortigiloj estas indiferentaj. Ĉiel, la rezulto estas la sama ; eĉ se la buĉistoj limigos la detruan povon. Tio, kion verŝajne ili preparis (as) dum la ĵusaj kulminaj konferencoj. Pro la evoluado de la armado, la atoma defendo fariĝas(os) kaduka. Laŭ tia projekto

tuta detruo ne okazos. Kaj la kutimaj militprofitantoj havos "belajn jarojn" antaŭ si. Krom se la buĉado finiĝus per atoma rebato. Memoru Hiroŝimon !.. Mi ĵus legis diron de la ministro de la nacia defendado ; ĝi aludis pri tio supre skribita (...tio estas la miriga necerteco de la nuklea malkuraĝigo..."

Nacia defendado implicas la ideon de farota milito. Jakelino, mia argumento estas aktuala, kaj ĝi valoros ĝis okazos radikala ŝanĝo en la homa socio. Tiu argumento fontas el la spertoj kiujn travivis la antaŭaj generacioj.

Kiam oni sufiĉe atentas pri la eksperimentoj en la inaj organoj, oni sin demandas, ĉu tiaj manipuladoj ne estas multe pli danĝeraj ol la cezaria operacio, eĉ la akuŝo, kiuj, fakte ne estas tute sendanĝeraj.

**Suzanne**

## *ANDROGINECO*

*(Nova paradigmo al socia kaj individua transformiĝo)*

*Denove nokte mi refoje relegis la verkaĵojn en la rubriko sub la titolo "Virinoj kaj Armeoj". Pleje plaĉas al mi la vortoj de Nicole D. Trafe ŝi tuŝis la kernon de la temo. Kredeble ŝi jam transformiĝis al nova paradigmo kaj akceptas androginecon en ĉiu individuo. Virino ne estas aparta specio. En ĉiu antropo pli-malpli vivas du tendencoj, kiuj laŭ vivaj cirkonstancoj sin disvolvas aŭ ne.*

*Prave ŝi asertas, ke per negativismo, senespero kaj malamo oni solvos nenion. Tiu aserto estas respondo al la demando de Jean-Claude : "Kiel eviti militon, por ke malaperu armeoj?" Edukiĝo sur individua bazo ! Persona disvolviĝo al memstareco kaj klarvido (t.e. la kapablo ekkompreni, ekkonscii). Jen ŝanĝiĝo, el kio rezultos kohera forto. Jam ĉie sur nia planedo tiu spirita forto ĝermas. Per la hodiaŭaj komunikiloj kreskas la nombro da klarviduloj en ĉiuj branĉoj kaj tavoloj sociaj, kaj ili deziras resaniĝon de civilizacia stato per nova vivmaniero. Transformiĝo estas la nova paradigmo por solvi problemojn. Ĉiu problemo estas solvebla, ĉar kio ne estas solvebla, tio ne estas problemo, sed akceptenda fakto. Ekz.: ne ekzistas io perfekta ; ne ekzistas la plej granda nombro ; ktp. Pri ili ni ne cerbumu ; nur agnosku la realon.*

*La supre nomita verkaĵo kaŭzis al mi seriozan ĝojon kaj pro tio mian dankon al kara Nikolin'.*

*19850515*, ***iea iu.***



## EN KIOMA JARO NI VIVAS NUN ?

Koboldo ŝtelis frazeron el la tiutitola artikoleto aperinta en L! 60, p.29 ! La kompleta demando de **iea iu** tekstis jene : "Ĉu la 31a de decembro 1899 estis la lasta tago de la antaŭa jarcento, aŭ ĉu la 1a de januaro 1901 estis la unua tago de la dudeka jarcento ?". Sed la legantaro ja reĝustigis mem, ĉu ne ? Kribo.

### PRI ERAOJ : kiam la jaro 1 ?

La kristana erao efektive naskiĝis en la (10)6a jarcento (elparolu "dekmirj-sesa", dankon), kiam abato Dionizo la Malgranda, post iom fantazia kalkulado, fiksis la daton de la naskiĝo de Jesu-Kristo en la jaro 753 "post la fondo je Romo", evento, kiu tute arbitre estis fiksita far' de Romaj historiistoj en la jaro (9)9248 (naŭmirj naŭmil ducent kvardek ok).

La sen-eraa (kaj mia-espere sen-erara) ĥronologio neŭtrala, kiun mi uzas, ebligas rapide kompari la "jarojn 1" de la diversaj eraoj, kaj ne havas religian subsencon : estas vere, ke la "jaro 1" de la kristana Erao falas ĝuste en (10)1, sed ne estas malpli vere, ke (laŭ historiistoj iom pli precizaj ol tiu Dionizeto) Jesu-Kristo naskiĝis proksimume en (9)9996 aŭ '97 kaj estis krucumita en (10)30, se oni rigardas veraj la historiajn donitaĵojn en la Evangelioj.

Kaj la tago "25a de Decembro" estis **elektita** por festi la kristnaskon (manke de regula naskiĝi-atesto) pro tio, ke en tiu tago oni festis la naskiĝon de Mitrao, persdevena dio tre populara en la unuaj jarcentoj de **nia** "mirjo" (t.e. jardekmilo).

Laŭ la ĥronologia metodo de mi uzata, nia mirjo, la dekunua, komenciĝis en (10)00.01.01, t.e. la unuan de januaro de la jaro Dekmirj ; aŭ ĉu estus preferinde, ke la jaro Dekmirj estus la lasta jaro (=(9)10000) de la deka mirjo, dum la dekunua komenciĝus en (10)01 ? Ba... Cetere, nenio aparte grava okazis, laŭ mia scio, en ambaŭ tiuj jaroj ; do ambaŭ solvoj taŭgas, kaj havas siajn avantaĝojn.

Mi legis, ke la jaro "1" laŭ la Izraelidoj respondas al (9)6241, dato retrokalkulita laŭ la Biblio (kaj la fantazio); tiu jaro rememorigas pri la kreado je la mondo far' de La Dio.

Ankaŭ la "aleksandria erao" estas kalkulita ekde la "mondkreo", sed tiu evento estas fiksita en (9)4501.

La "islama erao" komenciĝas en (10)622 per evento de la vivo de l' Profeto aparte grava por la islamaj kredantoj.

Mi ne scias, ĉu la japanoj ankoraŭ uzas kelkfoje la imperiestran eraon komenciĝantan en (9)9341, aŭ nur la "komunan eraon" ekde (10)1.

La malavantaĝo de la "komuna erao" estas tio, ke la jaroj antaŭ la jaro 1 fariĝas negativaj, kaj krome la povra Dionizeto "forgesis", ke inter 1 kaj -1 kuŝas...NUL! Sed tiutempe oni ankoraŭ ne konis la "nulon", kaj uzis la romiajn "nombrojn" : I, II, III, IV, V ktp.
Oni ankaŭ ne konis, kiom longa estas la prahistorio de la homaro. Laŭ la mirja-ĥronologio, kiun mi uzas, ĉar estas tre komforta, la jar-numero NENIAM fariĝas negativa, nek la jarcent-numero, nek la jarmil-numero : en la unua de januaro de la jaro Nulmirj (t.e. (0)00.01.01) laŭ mia scio okazis nenio aparte grava por iu aŭ tiu religio aŭ ŝtato (cetere mi forte dubas, ĉu en tiu fora epoko ekzistis religioj kaj ŝtatoj!!) kaj ankaŭ la antaŭa tago,(-1)9999.12.31, estas same neŭtrala.

Se oni uzas nur kardinalan nombron por esprimi tagojn, monatojn kaj jarojn, la unua tago de nia jarcento estis (10)1900.01.01, la jaro 1900, krome, estis la 1900a jaro de la "komuna erao", kiu komenciĝis en (10)1, sed ĝi estas ankaŭ la 1901a jaro de la Dekunua Mirjo, kiu ja komenciĝis en (10)0, t.e. en la jaro Dekmirj.
Mi preferas uzi la ordinalajn nombrojn nur por jarcentoj, jarmiloj kaj mirjoj, kaj nur kiam tio necesas.
Krome, tre ofte mi subkomprenas la indikon de mirjo, jarmilo aŭ eĉ jarcento, kiam ili estus superfluaj : ekz. se iu naskiĝis en (9)8736, normale mi skribas nur 8736, kaj nur '36, se mi estas studanta la historion de la 88a jarcento (de la deka mirjo, kompreneble). Se tiu persono estus aparte grava por vi, vi povus tuj konstati, ke (10)736 estis la dumila jaro post ĝilia naskiĝo, kaj (10)1736 jam la trimila, kaj (10)1936 jam la trimilducenta !
Ne necesas krei eraon por ĉiu historie (aŭ legende) grava persono aŭ evento, kiam povas sufiĉi elementa aritmetiko. Kompreneble, se iu trovos erarojn en tia ĥronologio, tiu estos tre dankinda se ilin korektos...

**Ĉiz el Lamark**

### En kioma jaro ni vivas nun ?

Oni ne scias ekzakte la daton de la naskiĝo de Kristo. Ĝi estis fiksita iom arbitre je 800 jaroj antaŭ la kronado de imperiestro Karlo la Granda. Oni scias nur, ke en tiu epoko oni ĉiam kalkulis "kun eksceso". Tio estas je la unua momento de jaro (aŭ jarcento) oni konsideris la tutan. Do ne povis ekzisti jaro nula ! Tiu tabuo de la nulo malaperis poste, sed oni ankoraŭ uzas en multaj kazoj la malnovan manieron, kvankam estas malfacile kaj erarige kalkuli tiel. (Ekzemple : 3 tagojn por la 36 horoj de Kristo en la tombejo!). Por povi kalkuli senerare kaj tamen ne ŝanĝi la numeron de la jaroj, la astronomoj kalkulas "kun manko" per la nombroj "kun eksceso", uzante do iun jaron nulan fiktivan (tio ne simpligas la aferon por la ordinara homo!). Do tutcerte ni estas en la 1985a jaro kaj en la 20a jarcento (do 1984 + kelkaj monatoj, 19a jarcento + kelkaj jaroj) 85 kaj 20 estas "kun eksceso", 84 kaj 19 estas "kun manko".
La 20a jarcento komenciĝis je la 1-a de januaro de 1901 (je la 0 h 00), la 19a finiĝis samtempe je la 31a de decembro 1900 (je la 24 h. 00). Tamen astronomoj por kalkuli uzas la 31an de decembro de 1899 je la 12 h. 00, tagmeze, universala tempo. Konkludo : ni ĉiuj rajtos festi la ekon de la 21a jarcento dum pli ol tuta jaro, de la astronoma pseŭdodato ĝis la vera oficiala dato !

**P.M.G.**

## CIRKLOKVADRATURO. KIU PRAVAS ?
## Aritmetika solvo.

*Cirklo estas cirkliĝinta kvadrato kaj kvadrato estas kvadratiĝinta cirklo. Tio estas facile eksperimentebla per ringo el fleksebla drato kaj per kojno piramidforma.*

*Pro la transformiĝo la unika cirkla radiuso fariĝas 4 medianaj kaj 4 diagonalaj radiusoj de la kvadrato, kaj dispartigas la cirkonferencon laŭ 8 segmentoj, kiuj fariĝas 8 duonlateroj de la kvadrato.*

*Ĉar ĉiu kvadrato konsistas el 4 kvadratetoj, ĉiu kvadrateta diagonalo aparte profitas entute la mallongiĝon de la medianoj konsistigantaj 2 el la lateroj. Konsekvence, ĉiu diagonalo de la granda kvadrato profitas la 4 mallongiĝojn de ambaŭ medianoj plus la parton ŝuldatan al la rektiĝo de 4 el la 8 cirkonferencosegmentoj. Do, la diferenco inter la longecoj de unu diagonalo kaj de unu mediano indikas pri la transformiĝo de cirklo al kvadrato kaj ebligas trovi la rilaton kun la origina radiuso de la samarea cirklo.*

*Per cirklilo kaj tabulo de damludo estas facile konstati, ke la latero de kvadrato estas la 7/10 de ĝia diagonalo, kiu mem estas la 10/7 de la latero : kiam la latero estas 7, la diagonalo estas 10.*

*Komparante tiujn frakciojn, oni konstatas, ke 10/7 kaj 7/10 = 100/70 kaj 49/70. Tio signifas, ke, elektante 70/70 kiel komparilon, oni aldonis 10-foje la plusan diferencon 3/7 al la diagonalo, t.e. 70/70 + (3/7X10) = 100/70, kaj subtrahis*

7-foje la minusan diferencon 3/10 el la latero, t.e. : 100/70 - (3/10X7) = 49/70. La diferenco inter ambaŭ frakcioj, t.e. : 100X70 - 49/70 = 51/70 do reprezentas la sumon de unu diagonala plilongiĝo kaj de unu mediana mallongiĝo. Ĉar la mediana mallongiĝo kondiĉas la diagonalan plilongiĝon, la diferenco inter ambaŭ : 30/70 - 21/70 = 9/70 devenas de tio, ke la mediana mallongiĝo aldoniĝas, ĉe la diagonalo, al la neŝanĝiĝinta origina diametro de la samarea cirklo. Konsekvence, por retrovi tiun originan diametron, sufiĉas subtrahi la minusan diferencon el la diagonalo, t.e. : 100-21 = 79. Do la radiuso estas : 79:2 = 39,5.

Ĉar la duonlatero de la kvadrato estas : 70:2 = 35, la minusa diferenco 21 konsistas el (9X2) aŭ (39,5 - 35)X4 = 18 plus (21-18) = 3 ŝuldata al la rektiĝo de 4 el la 8 cirkonferenc-segmentoj t.e. : 3:4 = 0,75 por ĉiu segmento.

Se anstataŭ esti diametro, 79 estas radiuso, la diametro estas 158, la latero de la koncerna kvadrato 140 kaj la diagonalo 200. La minusa diferenco mem fariĝas : 200-158 = 42, kaj konsistas el : (9X4) + (1,5X4) = 42. La longoj duobliĝas, la surfacoj kvarobliĝas.

Resume, la rilato inter la diametro kaj la latero de samareaj cirklo kaj kvadrato estas 79/90 kaj reciproke 70/79. Ĝi estas ankaŭ tiu inter la cirkonferenco kaj la perimetro.

El tio montriĝas, ke, por ricevi la racionalan nombron PI, sufiĉas dividi la surfacon de iu ajn kvadrato per la kvadrata radiuso de samarea cirklo. Se la kvadrata latero estas 14, la surfaco do estas : 14X14 = 196. Ĉar la diametro de samarea cirklo estas : 14X79/70 = 15,8, la radiuso estas 7,9 kaj la kvadrata radiuso : 7,9 x 7,9 = 62,41. Do la kvociento estas : 196/62,41 = 19600/6241 = 3,1406 aŭ pli precize : 3,1405224. Ĉe la kontrolado 3,1406 donas 2 nulojn post 196 kaj 3,150224 donas 5 nulojn. Ĉar la decimala denominatoro 62,41 fariĝas 6241 ĉe la dividado, 3,1406 do estas la racionala PI kvociento de du entjeroj.

Cetere, kiam oni scias pri la ĉi-supraj rilatoj inter la cirklo kaj la kvadrato, la nombro PI fariĝas praktike senutila, krom kiel kontrolilo, ĉar per unu dimensio, aŭ de la cirklo, aŭ de la kvadrato, eblas scii pri ĉiuj dimensioj de la alia.

Por ne tro rabi da loko en "Laŭte!", mi lasas al la interesatoj la plezuron mem esplori ĉiujn eblecojn liveritajn per tiu J.Ŝtrumpfa procedo. Ek al viaj kalkuliloj !

Nun la "obstina kvadraturisto" prezentis sian solvon kaj la "Laŭte"-legantoj povas prave juĝi kaj konkludi.

Persone mi pretas konsenti, ke J.Ŝ. malpravas, sed necesas, ke oni demonstru al mi, kial li malpravas.

Restas nur la demando : kial tiu problemo estas de jarmiloj



konsiderata nesolvebla ? Ĉu pro tio, ke la matematikistaj rezonoj ne rilatis al la vera problemo ? Ĉu pro alia motivo ? Ankaŭ pri tio la "Laŭte"-legantoj mem juĝu kaj konkludu.

Mia nura celo estis : provi demonstri, ke la nesolvebleco de la problemo pri la cirklokvadraturo, kaj ke la neracionaleco de la nombro PI estis "opinioj truditaj kiel nekontesteblaj veraĵoj", t.e. : dogmoj. Se J.Ŝ. pravas, mi plenumis mian celon, kaj tute ne intencas plu "ĝeni la fakulojn"(?) "ĉu paranoje, miskomprene aŭ alicele." (?).

Mi spitas al konceptoj, ne al konceptantoj. Precipe kiam tiuj ne montras emon memceli al Vero, kio necesigas la senĉesan memreviziadon de la konoj, kaj la senlacan spitadon al la dogmoj instruitaj en ĉiuj apartaj medioj.

"Laŭte!" ebligas tion : ĝi ne estas kateĥismo. Sed necesas, ke ĉiu partoprenanto en ĝi ludu laŭ la ludreguloj. Sen sincera celado al Vero ĉiu polemiko estas sterila. Tamen el humuso de sterilaj polemikoj foje ekaperas belaj kolektendaj floroj. Tiel la Naturo normale renoviĝas, kaj "Nur de merd' al merd' per merdo l' Homo dias". Inter la homa intestaro, la Tero kaj la Kosmo nur estas skaldiferencoj... sed tio estas ja alia J.Ŝtrumpfaĵo.

Ek al viaj kontroliloj !

Anonima B.G.D.)Eymet(

## HOMOJ KAJ AŬTOJ

Okaze mi diras, ke mi aprobas la debaton "Homoj kaj Aŭtoj" kaj aprobas ĉefe la kontraŭaŭtulojn. (Ankaŭ mi posedas propran veturilon).

Ĉar Michel (li ne estas la unua) proponas senpagan komunan transporton, mi volas atentigi pri alia afero. En la grandaj urboj la komercistoj volas prefere komerci en la centro, kie ili havas pli da aĉetantoj. Tial la loĝantoj de eksteraj partoj devas iri al centro kaj plejmulte faras tion per aŭto.

Se oni helpus la komercistojn, kiuj restas en la ekstero, la eksteraj loĝantoj ne bezonus perdi tempon kaj vojaĝmonon por iri aĉeti en la centro kaj tiu ĉi havus malpli da trafiko. (Sed ankaŭ estas malfacile, burokratisme zorgi pri ĉio).

**L.A.**

### PRI GRAMATIKAJ GENROJ

Ĉar estas malagrable kaj ofte erarige uzi "ĝi" por persono, kies sekson oni ne indikas, kial ne uzi "ili" sen konsidero de nombro same kiel "vi" ? Fakte, la tiel nomitaj "pluralaj" formoj logike estas nur ĝentilaj formoj, la veraj pluralaj formoj devus esti mij, vij, lij, ŝij, ĝij... se oni obeus la logikon ! Anstataŭe ni obeas la fundamenton, sed ja viva lingvo rajtas evolui !...

P.M.G.

## LA PLEJ KARESA SUFIKSO FINE MALKAŜITA

La sufiksoj en Esperanto havas kutime la strukturo: vokalo + konsonanto (-an, -in, -uĉ, -il, -et, -eg...) kaj estas uzeblaj ankaŭ kjel apartaj vortoj : ano, ino, eta ktp. La sufiksoj --ĉj kaj -nj **ŝajnas** neregulaj : kial tiuj karesaj sufiksoj ne komenciĝas per vokaloj, kiel ĉiuj aliaj ? Nu, fakte ili ja estas regulaj, ĉar ekz. "panjo" estas efektive "pa-njo" t.e. la karesa mallongigo de "patr-in-j-o : kie oni povas konstati, ke la vera sufikso karesa estas la duonvokala-duonkonsonanta "j", kiu algluiĝas al la seksa sufikso. La samo valoras pri "patruĉjo", kiu fariĝas "pa-ĉjo". Sed "patrinjo" kaj "patruĉjo" kune ne estas "gepaĉjoj" (???), ĉar la sufikso "uĉo" estas certe seksohava kaj tute ne eblas - almenaŭ laŭ mi - la ekzisto de "pa**ĉ**joj" **de du diversaj seksoj** ; la ĝusta formo estas "gepatrjoj".
Ĉu "-j-" estas nenormala sufikso ? Ja ĝi ne estas vokalo + konsonanto, sed duonvokalo kaj duonkonsonanto... Sed en ĝia mallongeco kuŝas ĝia utileco : ĝi ne formas apartan silabon kvankam ĝi povas esti dolĉe vibrata en la karesaj vortoj, ĝin povas ankaŭ elparoli rapide la praktikuloj. Eĉ ĝi povas esti tre utila en la kemiaj element-nomoj :
Ekz. titanjo, neptunjo, uranjo, heljo, plutonjo, telurjo, selenjo ktp. estas laŭ mi ĝustaj kaj tute internaciaj nomoj por tiuj mineraloj, kies nomo devenas de la dioj Titanoj, Neptuno, Urano, Helio (= la suno), Plutono, Teluro (= nia Tero), Seleno (= nia Luno).

Konsentu, ke "heli**umo**, titani**umo**, neptuni**umo**..." kaj plu-ume antaŭen estus terure pezaj kaj unutonaj nomoj.

Povas esti, ke mi estas "reinventanta la akvon varman", ke jam la kemiistoj uzas raciajn nomojn, kiujn mi ne konas ; sed pri la nomo de la nomitaj kemiaj elementoj mi inventis nenion sed nur kopiis el la itala lingvo. Sed efektive tiaj nomoj povus esti rigardataj kjel raciaj kaj belsonaj mallongigoj de la plenaj formoj "heliumo", "titaniumo" ktp.

Do, sufikso -j- servus por mallongigoj, jen karesaj, jen kemiaj. Ĉu eblas konfuzo ? Nu, se amatino de Neptuno volas nomi lin "Neptunjo..." miaopinie la voĉtono estus tute alia, ol tiu de kemiisto parolanta pri "neptunjo" (kun minuskla litero). Kaj cetere, la ĝusta formo por karesi la nomon de tiu mar-di**uĉo** estus, kompreneble, "Neptuĉjo"! Mineralo povas esti senseksa, sed laŭ la legendoj Neptuno ne estis tia!

**Ĝiz el Lamark**



***Pri la "Analiza Gramatiko" (5)***
*(L! n°60)*

*Post la tre klara respondo de Waringhien, S-ano L. Mimó tamen persistas pri la devigo uzi "tiom, kiom" ĉiufoje kiam temas pri kvanto aŭ grado (daŭre konfuzante ambaŭ nociojn), kaj rezervi "tiel, kiel" por maniero aŭ kvalito.*

*Nu, kio estas kvalito ? Tio estas "la nomo de kvanto, kiun oni ankoraŭ ne scias kalkuli aŭ mezuri". Tiu ĉi difino pravigus tre ĝeneralan uzadon de "tiom, kiom". Mi volonte elektas tiun uzadon, kiam mi deziras akcenti tiun aspekton, sed tio estas afero pri nuanco.*

*Nu, pri esprimo de nuancoj, bonvolu lasi ĉiun libera laŭ lia propra gusto. Ne trudu al ni, en la nomo de pretenda logiko aŭ rigoro, inventitajn regulojn, kiuj ne ekzistas. Al ni sufiĉas la dek ses de la Fundamento, kiujn ni strikte observadu. Ekster ili ni postulas liberon.*

***Valo.***

---

## ANALIZA GRAMATIKO (6)
************************

## Ĉiuj argumentoj pri la verbaj aspektoj en Esperanto

1. Zamenhof ebligis esprimi la aspektojn per afiksoj jene : Komencon aŭ momentecon, per **ek-** ; daŭron, per **-ad** ; ripeton per **re** ; kaj perfektivecon, t.e. ĝisfinecon kaj kompletecon, per **el-**.

Ekzemploj :
Eklerni, lernadi, relerni kaj ellerni.
Tamen plej ofte oni uzas la verbojn sen ĉi tiuj afiksoj, t.e., ne esprimante la aspektojn.

2. Tiuj ĉi aspektoj estas esprimeblaj ankaŭ per adverboj, verboj, aŭ adjektivoj, sed neniam per la simplaj aŭ participaj verbaj finaĵoj.

Ekzemploj :
Komenci lerni ; longdaŭre, senĉese lerni ; denove aŭ alifoje lerni ; tute, komplete, ĝisfine lerni ; lerni la tutan lingvon, k.c.

3. La verbaj finaĵoj **-is, -as, -os, -inta, -anta, -onta, --ita, -ata, -ota** esprimas nur tempon, kaj ili NEK POVAS ESPRIMI, NEK EKSKLUDAS PERFEKTIVECON, t.e. plenan efektivigon.

Ekzemploj :
En la 16a jarcento oni konstruis la katedralon nur parte . (Oni ne elkonstruis ĝin.) -- En 1573 oni estis konstruinta la katedralon nur parte ; ĝi estis konstruita nur parte. (Ĝi ne estis elkonstruita.) -- Li fermis iomete la pordon. (Li ne elfermis ĝin.) -- La pordo estis, estas aŭ estos duone fermita. (Ne elfermita.) -- Ni atingis nian celon nur parte. (Ni ne elatingis ĝin.) -- Ni estis atingintaj nian celon nur parte. (Ne, elatingintaj.) -- Nia celo estis, estas aŭ estos atingita nur parte. (Ne, elatingita.)

4. Neniu verbo estas sen daŭro, eĉ se nur momentera.
Ekzemploj :
En momento fulmo mortigas vivanton, kaj vivanto estas mortigata de fulmo. -- La sapveziko estis krevigata. (Tamen agoj ĝisfinaj.)

5. Estas verboj tute ne perfektivaj, ĉe kiuj ne havus sencon uzi la prefikson **el-**.
Ekzemploj :
Ami, esti, ŝajni, daŭri, gapi, ridi, k.t.p.

6. Multaj verboj estas kvazaŭ perfektivaj, sed okaze konvenas precize esprimi, ĉu ili estas tiaj aŭ ne. Oni povas komplete, ĝisfine, perfektive aŭ nur parte konstrui, pentri, fari, atingi, fermi, trafi, lerni, ripari, kovri, kapti, k.c.
Ekzemploj :
Se oni diras "fermu la okulojn", aŭ "ŝi faris, faras aŭ faros kuron", ĉiuj interpretas, ke temas pri ago kompleta, ĝisfina. Oni diras "fermu la pordon", kaj neniu demandas, ĉu "ekfermu","fermadu" aŭ "elfermu" ? Tamen ĉiam oni povas precizigi : "Li riparos la seĝon nur parte, aŭ tute, t.e., li riparos ĝin." -- Li atingis nur partan rezulton aŭ sukceson. -- Lia celo estis, estas, estos elatingita aŭ plene atingita. -- Oni ne povas pasi tra (el)fermita pordo, sed jes tra duonfermita. -- Ĝis nun Esperanto ankoraŭ estas ellernita de neniu.

Oni ne povas diri "parte ellerni", "parte ellernata" aŭ "parte ellernita", ĉar tio estas du kontraŭdiraj aspektoj.

7. Aliaj verboj estas per si mem tute perfektivaj, esprimantaj agon, kiun oni elfaras, faras tute, aŭ tute ne faras ; verboj, kiuj, tial, eĉ ekskludas la uzon de el-. Tiaj estas vundi, murdi, mortigi, transnaĝi, preterpasi, krev(ig)i, surpaŝi, k.c.



Ekzemploj :
Oni ne povas diri elvundata aŭ elvundita, ĉar oni povas vundi pli aŭ malpli grave, sed nur komplete, tial ke eĉ plej eta vundo estas tuta vundo. -- Oni ne povas murdi parte. -- Oni transnaĝas kanalon tute, aŭ oni ne transnaĝas ĝin se oni ne atingas la transan bordon.

Escepte, tamen tute trafe, Zamenhof uzis el- en la verbo "elmortigi" kun la senco "akceli aŭ tujigi la morton" (Hispane : rematar ; france : donner le coup de grâce.)

8. Pro tio dirita en la apartaĵoj 5 kaj 6 kaj 7, la perfektiva prefikso **el-** estas uzenda kaj uzata nur tre malofte.
Apenaŭ iam povas esti konfuzo pro la prepozicia signifo "de interne". "Elverŝi" kaj "eltrinki" estas konvenaj nur kun la perfektiva signifo ; ja oni povas verŝi nur el la interno de io !
La kontraŭfundamenta anstataŭigo de **el-** per **fin-**, kiu ne estas prefikso, estas unu el la absurdaj koruptoj de nia lingvo. Tiom nelogike kaj sensence estas diri finlerni anstataŭ ellerni, kiom diri komencilerni anstataŭ eklerni.

9. Se perfektiveco reale estus problema en la pasiva, ĝi estus tia ankaŭ en la simplaj **-is, -as, -os** de la aktivo. Ne estas aspekta diferenco inter **-is** kaj **estis -ata** aŭ **estis -anta**. Kiel **-is, -ita** esprimas nur pasintecon.
Ekzemploj :
Li mortis (mal)rapide. -- Li estis mortanta (mal)rapide. -- Li estis mortigata (mal)rapide. -- Li estis mortigita (mal)rapide. -- Oni estis mortiginta lin (mal)rapide. (Kompreneble, tute, perfektive, tial ke oni mortas tute, aŭ oni tute ne mortas.)

10. La participaj formoj ne povas esprimi perfektivecon, pro tio ke ili esprimas tempon, kiu, kiel agnoskas Plena Analiza Gramatiko, ĉiam estas relativa al tiu de la predikato, t.e., al la tempo pri kiu oni parolas, kaj neniu pretendis ke ĝi estas absoluta, rilatanta nur al la nuno, kaj des malpli, ke ĝi estas konvencia por ĉiu kazo kaj okazo, kio farus la Esperantan konjugacion la plej malfacila en la mondo.

11. Pluskvamperfekto ekzistas, kompreneble.
"Li estis ferminta la okulojn" kaj "liaj okuloj estis fermitaj de lia filo" estas pluskvamperfekto, t.e., ago antaŭa al preterita tempo. Surbaze de eraraj aŭ misinterpretitaj ekzemploj de Zamenhof, kiu, kiel ĉiuj homoj, estis erarema, oni starigis

la teorion ke, responde al la simpla formo aktiva pentris, por esprimi perfektivecon, kiun pentris ne esprimas, en la pasivo oni devas diri estis pentrita anstataŭ estis pentrata. Sekve oni devis deklari, ke pluskvamperfekto ne ekzistas en Esperanto, kaj oni ne povus plu distingi, sed nur konjekti, ĉu oni volis esprimi ke iu pentris, aŭ ke estis pentrinta. Entute nur falsa problemo, ĉar en la simpla regula Zamenhofa lingvo oni devas diri perfektive :

Li elpentris la portreton. = La portreto estis elpentrata.
Li estis enpentrinta la portreto. = La portreto estis elpentr-ita.

12. Kiel en la rusa lingvo.

Oni pretendas, ke Zamenhof volis esprimi perfektivecon per la pasiva participo pro tio ke oni esprimas ĝin en la rusa lingvo ; sed Prof. E.N. Setätä diris, ke en tiu lingvo oni ne esprimas la aspektojn per apartaj verbaj formoj, sed per aliaj verboj derivitaj de la sama radiko, kio montras, ke tiu supozo estas erara; ĉar, se konvene, ankaŭ en Esperanto la verboj, kun aŭ sen afiksoj, esprimas per si mem, kiel ni jam vidis, la aspektojn de komenco aŭ momenteco (krevi,salti,ekvidi, inici, ekuzi, ektuŝi, eksplodi, starti), daŭro aŭ plurfojeco (plori, abomeni,kontinui,soni,uzi,batadi,ami,tuŝi,diskuti,diskutadi), ripeto (reveni,relegi,ripeti,rekonstrui,insisti,revidi) kaj ĝisfin-eco (atingi,eluzi,trafi,bati,elkonstrui,ekzekuti,transsalti,ulceri, ellerni).

13. Regulo.

La uzo de la participoj, pri kiu la esperantistoj jam estas tute konfuzitaj, estas facilega eĉ por infanoj :

Ĉe ĉia ajn verbo, uzu **-it** NUR kiam en simila frazo en aktivo vi mem uzas **-int** ; uzu **-ot** nur kiam en simila frazo en aktivo vi mem uzas **-ont**.

Ekzemploj :

Vundito, vundita homo. = homo, kiun oni estis, estas aŭ estos vundinta. -- Li respondis ĝenite, kaj vi estis kontenta ĝeninte lin. -- Kiam ni venis, la vilaĝoj estis detruitaj, ĉar la militistoj estis detruintaj ilin.

**L. Mimó**

**INTERNACIA TEND-KAMPADO** : Erich-Mühsam-Centro, alte Forststr.3, D-6738 Elmstein (Okc.Germanio) aranĝos la renkontiĝon por ĉiuj anarkiistaj aù liberecanaj gekamaradoj, de la 13a ĝis la 15a de septembro 1985, en la Palatina Arbaro. (La renkontiĝo ja celas ne nur esper(A)ntistojn, sed 6 el la organizantoj nun lernas E-on kaj 1 el tiuj estas L!-abonanto kaj tute ne anark-isto... nu!...) Baldaù pli konkretaj informoj...



# Ree pri la verbaj aspektoj en Esperanto

"Akademiaj Studoj 1984" publikigis du artikolojn miajn, per kiuj evidentiĝis, ke ne estas necese esprimi aspektojn per la participoj, kaj ke la pasiva **-it** nek esprimas, nek povas esprimi perfektivecon, elplenumitecon, ĝisfinecon, kiun esprimas la fundamenta prefikso "el-". Lernita kaj uzita tute ne signifas ellernita kaj eluzita. Neeble refuti tion ĉi, kiel ankaŭ la argumentojn de tiuj miaj artikoloj. Veraj sciencistoj antaŭ elpruvita evidentaĵo akordiĝus, sed, ho ve!, la esperantistoj, ne, pro tio ke nia lingvo fariĝis afero de fido... kaj de persona prestiĝo. Malmulte gravas la forpasantaj kaj la forpasintaj personoj ; kio gravas estas la lingvo kaj ĝia celo. Sed pro tio ke en la teatro de la vivo ludas la diversajn rolojn la personoj, pri personoj oni devas paroli.

La akademiano redaktoro de "Akademiaj Studoj", "por doni bazon por espereble fruktodona diskuto", publikigis miajn artikolojn kun aliaj de profesoro Frank kaj de sinjoro Ŝulco, "esperante ke en venonta volumo li povos publikigi almenaŭ respondojn de individuaj akademianoj, se ne estos eble ĝis redaktofino ricevi la oficialan respondon de nia Gramatika Sekcio."

Kiel en infero, oni forlasu ĉian esperon. Ne estis respondo, ĉar ĝi devus esti rekona, kaj tio minacus renversi "la establitan socian ordon". En "Akademiaj Studoj 1985" troviĝas du artikoloj de "itistoj" pri la sama temo, sed la aŭtoroj, kiuj evidente konis la miajn, ignoris ilin kaj ŝvebas en siaj eteraj regionoj, for de la sciencaj surteraj realaĵoj, kaj tiel ili pluigas la vanan dialogon inter surduloj. Nu, mi, kiu ne estas surda, defaligos ilin per raketo de evidenteco.

Profesoro doktoro Ivo Lapenna, en "Pri la pasivaj participoj -ATA kaj -ITA", diras ke en la lasta tempo aperis monografio kaj kelkaj artikoloj, sed, probable por eviti propagandon, li ne diras kies ; kaj, respondante al neniu kaj prezentante kiel atestanton D-ron Zamenhof, kiu, mortinta, ne povas lin kontraŭdiri, li intencas pravigi "itismon" per misinterpretitaj zamenhofaj ekzemploj. Estas nekompreneble, ke longe tiom da universitatuloj ne komprenis, ke la signifo de la frazo en pluskvamperfekto, "Georgo Vaŝington estis naskita la dekduan de februaro..." estas en aktivo "La patrino de G.V. estis naskinta (ne naskis) lin la 12-an de februaro" ; ke en ambaŭ frazoj estas ago jam preterita en preterita tempo ; tute ne prezenca kaj ĝisfina en preterita tempo, kiel tute senbaze pretendas "itismo". Nei, ke en E-o pluskvamperfekto

ekzistas, estas sofismo same absurda kiel la aserto, kiun iu tamen faris, ke nun en la lingvoj, aparte en Esperanto, ne ekzistas kazoj kaj vortspecoj, nome adjektivoj, substantivoj, k.c.

Ankaŭ estas en pluskvamperfekto, plia pruvo ke ĉi tiu ekzistas, lia dua ekzemplo : "Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita" = "Oni jam (longe) estis konstruinta ĝin." Se iu ankoraŭ havas dubojn, memoru la simplegan regulon : "Uzu **-it** nur kiam en simila frazo en aktivo vi mem uzas **-int**". Tiom simpla, ĝi forigos ĉian dubon.

Pardonu min la homoj de fido. Kvankam Zamenhofa, ĉi tiu ekzemplo, kiun Lapenna prezentas kiel modelan, estas erara. Ĝusta, ĝi estus : "Kiam via domo estis konstruata, mia domo domo estis jam de longe konstruita." En aktivo, "Kiam oni konstruis vian domon, oni estis jam de longe konstruinta la mian." Pura esprimo nur de tempoj !

Iu povus pensi, plian fojon, ke kiu eraras estas mi. Nu, se ĝi ne estus erara, ĝi pruvus la erarecon de "itismo", ĉar se "konstruita" havus en pasivo la signifon de "elkonstrui", en "longe konstruita", kiel en "longe elkonstrui" troviĝus du kontraŭaj aspektoj ; tiu de daŭro kaj tiu de ĝisfineco, kaj daŭre elfini unu solan domon estas neeble.

Plu erarante, Lapenna aldiris : "La forto de **a** estas tiel (tiom!) granda, ke eĉ se en la aktiva formo oni uzas la prefikson **-ad** por esprimi la longan daŭron aŭ ripetiĝon de la ago, en la pasiva -ata formo oni ĉiam ellasas ĝin. Ekzemple, "Li verkadis tiun libron dum unu tuta jaro", sed "tiu libro estis verkata (ne verkadata)..."

Tretadata, disbatadata, bekadataj vinberaroj, estas belaj, vastesprimaj verbaj formoj ne forigeblaj, kvankam ĝenerale en prezenco ne estas necesa **-ad**, kaj en aktivo, kaj en pasivo. Cetere, lia pleonasma ekzemplo ne estas modela, tial ke, ĉar dum tuta jam esprimas daŭron, **-ad** estas superflua. Estas pli bele simple diri, ke li verkis tiun libron dum tuta jaro. Neniu imagus ke tio estis momenta ago.

Ĉio cetera, ne aparte interesa, estas jam refutita en mia artikolo, kiun mi sendis al li kaj al ĉiuj ceteraj akademianoj, kaj kiun nek li, nek iu alia el tiuj, kiuj aplaŭdas itismon, provis refuti, kio faras miajn argumentojn neoficiale aprobitaj de la Akademio per pluraj favoraj voĉoj kontraŭ la silento de la ceteraj.

M. Malovec, sub la sama titolo de tiu mia artikolo, "La "verbaj aspektoj en Esperanto", kio montras ke li legis, sed ignoras ĝin, nur ripetas konceptojn pri la malsamaj konjugacioj



kiuj konvenus laŭ la komplika klasifiko de la verboj, farita de la itisma skolo, kio, ĉar sur falsa bazo, kondukas al nenio.

Krome, "Akademiaj Studoj 1985" enhavas kritikan analizon pri la sama demando rilate al la Akademio, de akademiano Reiersøl, kiu, kiel estas sciate, ne aprobas itismon, kaj ankaŭ studon de G. Cool, kiu, kvankam pli inklina al niaj konceptoj, kredis konvena meza solvo kun okaza evito de pasivo, konfuzita de la teoriaj komplikaĵoj elpensitaj por pravigi la aspektan teorion. Li sendis sian studon al mi, kaj sendube ni plene akordiĝos, ĉar li ne ŝtopis al si la orelojn de kompreno.

Ĉe klaraj kaj simplaj argumentoj, konsciaj esperantistoj ne povas levi la ŝultrojn indiferente, ĉar temas pri la raciigo kaj perfektigo de Esperanto, por ke ĝi estu inda esti prezentata al la Mondo kiel supera, matematike preciza lingvo, kaj ne kiel ĵargono de sekto.

**L. Mimó**

*****************************************************

## ĈU NI NE PAROLU PRI "VIVO DE LANTI" ?

*En la protokolo de la lastjara kongreso de SAT ni legas : "La lantiaĵojn ni tute ne vendas. Ekz. la "Vivo de Lanti" ni vendas eble kvin-jare, kvankam ĝi estas tre interesa kaj tre instrua. Se vi ne legis ĝin, nepre ĝin legu. Sed, bedaŭrinde ĝi estas morta kapitalo ĉe SAT. Do, se ni reeldonus la verkon de Lanti, ĝi riskus longe kuŝi en la stoko kaj mankas al ni spaco. La fondinto de SAT certe meritus esti pli legata de SAT-membroj. Bedaŭrinde, la faktoj montras la kontraŭon".*

*Lastatempe mi tamen trovis en malnovaj numeroj de "La Revuo Orienta" (1928), ke Ossaka Kenĵi, unu el pioniroj de japana esperanta movado, kelkfoje vizitis Lanti en 1927. En tiu jaro Ossaka restis en Eŭropo, kaj vizitis Britio, Francion kaj Germanion. Li publikigis serie artikolojn pri la tiamaj renomaj esperantistoj, kiujn li vidis en sia vojaĝo, en formo de taglibro. Mi tradukas la partojn, kiuj tuŝas Lanti, Limuzin kaj Krestanof, por ke la malmultaj interesatoj pri "Vivo de Lanti" kontentigu sian scivolemon.*

"La 15-an de aprilo (1927) : Vespere vizitis Lanty, ĉe kiu loĝas k-do Hasegawa. Lanty estas redaktoro de **Sennaciulo**, organo de SAT ; tute kontraŭe al mia imago, li estas ŝajne kvieta maljunulo. Li estas tamen ne tiel maljuna. Li sola redaktas Sennaciulon kaj laboras tiel energie, ke li iam fariĝas preskaŭ blinda. Kompreneble sen salajro. La dommastrumadon prizorgas

kamaradino Limousin, kiu naskiĝis en Hindio. Lanty ne scipovas la anglan lingvon. Tial ankaŭ Hasegawa parolas esperante de mateno ĝis vespero.
La 11-an de majo : Vizitis Lanti vespere. Invitis Lanti kaj f-inon Limousin al ĉina restoracio post rehejmeniĝo de Hasegawa.
La 16-an de majo : Laŭ promeso vizitis Laboristan E-Societon en Laborista Borso kaj prelegis pri "Japanaj Laboristoj".
La 26-an de oktobro : Forlasis Bruxelles je 13:25 kaj morgaŭ vespere atingis Parizon. Deponinte la pakaĵojn ĉe la stacio, per "metro" al la domo de Lanty. En la ĉambro, kie Hasegawa loĝis, nun estas Ivan Krestanof el Bulgario Li estas dungita por helpi redaktadon de SAT-gazeto.
La 31-an de oktobro : Vizitis Laboristan E-Societon kune kun Krestanof, kaj parolis pri "Tiel nomata internacieco de radikoj" petite, en kiu mi donis baton al la lingvo-uzo de SAT-anoj.
La 5-an de novembro : Je 14:00 vizitis Grenkamp, portis la librojn aĉetitajn ĉe li en taksion, kaj revenis kun li al la hotelo. Vizitis Lanty post iom da konversacio. Krestanof kverelis kontraŭ Lanty kaj forlasis lian domon. Invitis L., f-inon Limousin kaj G. al vespermanĝo en ĉina restoracio. Interparolis ĉe Café d'Harcourt.
La 9-an de novembro : Je 19:30 vizitis Gr. : ricevinte de li 20 ekz. de "Vortoj de Cart" kaj aliajn, revenis al la hotelo kun li per taksio. Je 16:30 vizitis Lanty por adiaŭi."

*Pri la restado de Lanti en Japanio estas malfacile trovi raportojn en la tiamaj esperantaj gazetoj. Lastatempe k-do TAKENAKA afablis montri al mi la aŭgustan numeron de "La Ora Delfeno" (1937), loka organo de E-grupo en Nagoya, en kiu ni legas jenan artikolon :*

"La 18-an de julio (1937) ĉ. tagmeze al Nogoya venis franca samideano Adam Lanti, akompanata de Takeuti Tôkiti (Yamasiro), de Osaka, travojaĝinte Nara ; ili estis akceptitaj de s-roj Yui kaj Nisida ĉe la stacio, kaj vizitis Nogoya-Kastelon kun ilia gvido. S-ro Lanti estas protagonisto en SAT kaj kontribuis multe por E-movado. Li estas maljuna sinjoro jam grizhara, kaj vizitis Japanion - ni aŭdis - por trovi lokon, kie li povos resti longe aŭ vivos ĝis la morto (?). Estas bedaŭrinde, ke ni ne povis okazigi bonvenan kunsidon por li pro aranĝo de la vojaĝplano, kvankam al Nagoya venis tia eminenta esperantisto."

*En "La Revuo Orienta" troviĝas nur unu sola artikolo pri kontakto de Lanti kun lokaj esperantistoj dum la tuta restado en Japanio (la aŭgusta n-ro de 1937) :*

"Ekde la 12-a de julio (1937) ekspozicio de E estis aranĝita ĉe "Gas-Bildingo" en Hirano-mati ; la 16-an vizitis Osaka franca esperantisto, s-ro Adam kune kun s-ro Takeuti. Ili vizitis ankaŭ la ekspozicieton kaj kunmanĝis kun la membroj de Osaka E-Societo ĉe la restoracio de "Gas-Bildingo" tiun vesperon. La interparolo daŭris ĝis profunda vespero kaj la kunsido finiĝis kun emocio.

*dokumentoj komentitaj de* ***TUBOTA kôki***



## Por nia medito :

# Fragmentoj el leteroj de E. LANTI

*"... Mi rimarkas, ke la koverto de viaj leteroj ne surhavas la nomon de SAT, nek la vorton* ***esperanto****. Tio estas vere bedaŭrinda, riproĉinda. Ni devas preterlasi nenian okazon propagandi esp-on al la granda publiko kaj SAT-on al la esperantistoj. Nepre necesas, ke vi mem ne nur havu celkonformajn leter-kovertojn, sed ke vi plie havu apartajn por la membroj, kaj ke vi instigu ilin aĉeti. Sur la kovertoj la vorto* ***esperanto*** *devus esti diklitere kaj verde presita, por altiri la atenton. Estas granda eraro kredi, ke la publiko en sia granda plimulto scias pri la reala ekzisto de nia lingvo. Ne sufiĉas la titolo S.A.T. Nia organizo havus absolute nenian signifon sen esp-o. Necesas do reliefigi tiun nomon. Kaj se inter la SAT-anoj estus artisto por aranĝi plaĉan, logan aspekton de la bezonataj leterkovertoj, tio estus tre utila. Kaj dume, vi almenaŭ havu stampilon kun la vorto* ***Esperanto****.*

*Tiuj ne tre gravaj rimarkigoj pensigis min pri la ĝenerala signifo de insignoj, simboloj k.s. Ni devas lerni de la sperto. Estas eraro prijuĝi ĉiujn homojn laŭ sia propra memjuĝo, kiu, cetere povas esti erara. Jam kelkfoje mi diris, ke la problemo* ***racio-intuicio*** *ofte estas ĉe mi cerbumiga. Mi alvenis al la opinio, ke la nura racio estas absolute nekapabla doni respondon al multaj demandoj. La racio ne estas* ***vivofonto*** *kaj se la homoj posedus nur tiun kapablon, verŝajne la homospeco malaperus. Cetere, la pura racio diras, ke tio estus tute ne grava. Nu, konsentite ; sed ĉar ni vivas, kaj ne sin mortigas, kaj plie serĉas celon por nia vivo, necesas do nin apogi sur alio ol sur la seka racio. Plie, la proporcio de racio kaj de mistiko tre varias de individuo al alia. Ne ĉiuj homoj havas la saman kapablon abstrakti. El tio sekvas, ke tute raciaj ideoj ne povas ligi forte kaj daŭre ĉiujn homojn. Se ni do volas, ke nia movado estu longviva, forta kaj efika, ni konsentu, ke por la homoj, kiujn ne povas ligi nuraj abstraktaĵoj, necesas konkretaj simboloj, emblemoj, kantoj eĉ ceremonioj. La falĉileto kaj martelo, la fasko kaj la svastiko, eĉ la verdaj standardo kaj stelo konsistigas iajn mistikajn fortojn, neniel malatentindaj. Tial SAT devas havi sian standardon, sian specialan emblemon ; unuvorte, ni ne devas malatenti la mistikon (bv. atenti, ke en la* ***Manifesto de la Sennaciistoj*** *mi aludas pri tio). Ni venkos la naciisman, patriotisman mistikon, se ni kapablas aliigi ĝin en iun alian pli altvaloran kaj celkonforman. La homeco ja devas venki la naciecon ; la*

*sennaciismo la naciismon ; sed ne eblas per nuraj raciecaj rimedoj kaj metodoj. La SAT-Kongresoj devas akiri ankaŭ religiecan karakteron. Ni kontraŭbatalu ĉiujn dogmojn ; sed eble la vera religieca (laŭ la etimologia senco : **re ligare**) spirito estas sendogma. SAT vivos kaj ludos pli kaj pli gravan rolon, nur se ĝiaj gvidantoj sukcesos atingi, ke la SAT-anoj sentas inter si fratecan ligilon ; en nia organizo ili forgesu pri sia aparta nacieco, partieco ktp. Ni venkis la bolŝevistojn; sed ni ne forgesu, ke neniam venko estas definitiva, se la venkintoj ekdormas ripoze sur siaj laŭroj. Kaj tial ke nia afero estas unue lingva, necesas atingi, ke la SAT-anoj ĝenerale estu la plej bonaj kaj lertaj esp-istoj. SAT devas havi la plej bone redaktitajn gazetojn kaj eldoni la plej valorajn verkojn en senriproĉa lingvo. La gvidantoj de SAT (kaj ĉefe la Redaktoro) devas akiri la spiritostaton de apostoloj..."*

(Letero al kdo B., 23.4.39)

*"... Ili protestas, kiam homoj estas batataj per nigra aŭ bruna bastono, sed indiferente silentas, se la batilo estas ruĝa...*

*"Kiu plej dolorigas la koron de homo, en kies konscienco vivas honesto, tio estas la konstato, ke ne ĉiuj homoj konscias pri la ekzisto de tia eco.*

*"Hitler fariĝis "Staattenloser" (sennaciulo), kiam li estis malmobilizita (1918). La tiama Registaro rifuzis al li la germanan civitanecon kaj li estis perdinta la aŭstran, pro tio, ke li volontuliĝis en la germanan armeon.*

*Tio pruvas, ke oni povas esti naciulo per la koro kaj jure tamen esti sennaciulo.*

*Simile eblas esti jure naciulo kaj kore, mense sennaciulo.*

*"La titolo de nia gazeto, redaktata en sennacieca lingvo kaj organo de Asocio, kiu reprezentas neniun nacion, estas do tute konforma al ĝia jura stato. Tio ne signifas, ke ties legantoj devas esti "sennaciuloj". Se la titolo estus **Sennaciisto**, tiam estus tute alia afero.*

*Notinde ankaŭ estas, ke nia Asocio estas "Sennacieca" kaj ne **Sennaciista**."*

(El la Notlibreto de Alfesto, 25.5.39)


*******************************************************

*Tiuj fragmentoj kompletigas la jus aperintan volumon :*

**"EL VERKOJ DE E. LANTI - 3a vol."**

*120-paĝa broŝuro, 20 FF, de nun mendebla ĉe SAT-Broŝurservo*

*******************************************************




**Distraj Matematikoj**

## LA "ORA NOMBRO" KAJ KIEL DESEGNI LA VERDAN STELON

Preskaŭ ĉiuj konas la "oran nombron". Ĝi estas magia nombro konata de post la pratempo. Oni uzis ĝin por konstrui piramidojn. Oni kutime nomas ĝin "phi" (por ne ĝeni la tajpiston, mi skribas "phi" anstataŭ $\varphi$ kaj "sqrt" anstataŭ $\sqrt{}$ tio signifas la samon).

Ĝia valoro estas 1,618034 aŭ, por la matematikistoj : [1 + sqrt(5) ] /2. La nombro phi havas amuzajn propraĵojn :


Se oni multobligas ĝin per si mem, oni obtenas 2,618034.

Nu, 2,618034 = 1 + phi

Same, se oni dividas la unuon per phi, oni obtenas :

1/phi = 0,618034 = phi - 1


Tiu nombro estis konata ĉefe de la konstruistoj, ĉar ĝi estas la rilato inter longeco kaj larĝeco de la "ora" rektangulo, t.e. la plej bela rektangulo. Pruve, se oni komparas la tri rektangulojn A, B kaj C :




Oni konstatas, ke la du unuaj estas malbelaj, dum la tria estas belega. Fakte, ĝi estas nek tro longa nek tro mallonga. (Se vi ne konsentas pri tio, tio signifas, ke via gusto ne estas taŭga).

Tial la arkitektoj faris konstruaĵojn, en kiuj oni ofte trovas tiun proporcion.

Alia amuza konata propraĵo : Se oni distranĉas kvadraton de la "ora rektangulo", oni obtenas novan oran rektangulon (pli malgrandan, kompreneble):




Oni povas pluigi la operacion, el paperfolio kaj per tranĉilo, ĝis oni obtenas "oran konfetion" tro malgrandan por esti distranĉata. Oni obtenas ankaŭ diversgrandecajn kvadratojn, kiujn oni povas meti en la rubujon, ĉar ili ne plu utilas...


Kaj la verda stelo ?

Paciencu. Mi alvenas al tiu temo.

Regula pentagono havas specialan propraĵon : la rilato inter la diagonalo kaj la latero estas... ĝuste **phi** !





Por desegni stelon (verdan aŭ ne), sufiĉas desegni la diagonalojn. Jen nun la konstruado :




AB estas la latero de la pentagono. Oni konstruas la duoblan kvadraton OCED (tia, ke OC = AB). Oni havas OE = sqrt (5)/2. Oni desegnas la rondon (centro O, radiuso OE) kaj obtenas M kaj N. Oni povas konstati, ke AM = BN = phi. Oni faras du rondojn : (centro A, radiuso AM) kaj (centro B, radiuso BN), kiuj renkontiĝas je F, la supraĵo de la pentagono. Oni nun konstruas G kaj H, tiel ke FH = FG = AB. Por tio oni povas uzi la cirklilon. Sufiĉas tiam desegni la diagonalojn FBHGAF. Jen vi obtenas belegan stelon. Nepre ne forgesu ŝmiri ĝin verda ! Se tiu konstruado ŝajnas al vi tro malsimpla, uzu tiun ĉi : Ĝi estas proksimuma, sed la stelo strange ŝajnas pli regula ol la alia. Provu mem... Eble temas pri optika iluzio...

**Ĵansebo.**

**KRUCVORTENIGMO de Sfinksido** (s.f. = sen finaĵo)



Horizontale :

1. Ĝi povas konsisti el nodo farita per la naztuko. 2. La unua ĉi-supre ne taŭgas por neniam forgesi ĝin. 3. Ktp. - Krustulo sen vosto. - Komencliteroj de fama hungara verkisto kaj gramatikisto. 4. Honorata de la ortodoksuloj. Juvelŝtono (s.f.). - 5. Kelkfoje, ĝi ornamas postpluvan ĉielon. - Tiuj, kiujn li ĉarmas, konservas sian kapon. 6. Plenda ekkrio. - Grandega besteja akvoveturilo. 7. Rutina metodo bazita sur nura praktika sperto. - Persona pronomo. 8. Rilata al iu reĝo. - Prepozicio. 9. Prefikso. - - Aŭrikulo (s.f.). 10. Konstelacio (s.f.). - Ĝi travidebligas seruron (s.f.). 11. Manko de diverseco.

Vertikale :

1. Agmaniero bazita sur la malrekono de ĉia moralo, sistema uzo de trompado (s.f.). 2. La frandaĵo de la koprofagiuloj. 3. La dekdua ĉe la grekoj. - Grupo de 8 personoj. - Prepozicio. 4. Gaso kun karakteriza odoro. - Planto, ĝardene kultivata, kun belaj flavaj floroj. 5. Murrompilo. - Kie la 2a de la 6a horizontala alteriĝis (s.f.). 6. Verba finaĵo. - Prepozicio. - Mll. sur koverto. 7. Ĝi ludas grandan rolon en la aŭtomata stirado de aviadilo. 8. Kvar por la malamikoj de Asteriks. - Respektoplene al religiaj aferoj. - P.p. rekto : farante kun ebeno angulon egala al 90°. 9. Parto de konstruaĵo kun difinita destino. - Minaĵo (s.f.). 10. Oĉjo por la genevoj. - La lokoj por fridujo kaj televidilo ne estas antaŭzorgitaj en ĝi (s.f.).

*********************************************************

# LAŬTAJ PETOJ KAJ INFORMOJ

**INTERNACIA SEMAJNO PRI INFORMADIKO**

De la 1-a ĝis la 6-a de julio 1985 en Bretonio (Francio). Dulingva (franca por Francoj kaj Esperanto) instruo de programado en BASIC kun praktikado per mikrokomputiloj, fare de profesiaj tiufakaj instruistoj. Favora prezo ĝis la 15a de majo (Laŭte! informas tro malfrue, bv. pardoni!) : ekde 1200 FF por kurso, loĝado kaj ĉiuj manĝoj por unu persono. La staĝo okazos en kvieta kaj agrabla kampara bieno. Pliajn informojn kaj aliĝilon petu de Christian Bertin, 60 allée de la Renaudière, F 35510 CESSON-SEVIGNE (Francio).

## ENKETO ĉe la JUNULARO

Esplorgrupo pri socia psikologio dezirus ekscii, kiel hodiaùaj gejunuloj (ĉirkaù 16-30-jaraj) de la mondo prezentas al si sian socion, kiel ili vidas la sociajn rilatojn. Kompreneble ni pensas pri la E-movado, ĉar la esperantista junularo estas tutmonda ; do ni povas atendi tre diversajn respondojn. Samtempe la esperantistoj estas eble specifaj. Ĉu la respondantoj sentas ian specifecon ?

En ĉiu medio kelkaj individuoj estas rimarkataj, distingataj. (Oni admiras iufoje, aliafoje oni timas, envias, kompatas aù malestimas aliulojn...). Iuj distingas individuojn ĉie sammaniere. Aliaj observas malsame, depende de tio ĉu ili estas en sia laborloko, en sia familio, sportante aù babilante kun amikoj.

1) Kiajn individuojn oni rimarkas ?
2) Kio en tiu ĉi rimarko dependas de la medio ?
3) Ĉu (kaj se jes, kiel) la epoko influas la reagon de la homoj?
4) Ĉu la junuloj sekvas la maljunulojn aù kondutas alie ?
5) Kio okazas al tiuj, kiuj ŝajnas diferencaj ?
6) Ĉu ekzistas "esperantistaj" agmanieroj, aù ĉu la esperantistoj reagas, kiel aliaj anoj de la medio ?

Ni ŝatus ricevi informon pri
* sekso, * aĝo, * profesio kaj * loĝlando de la respondantoj.
Bonvolu sciigi ankaù,
* kiamaniere vi eksciis pri nia enketo.

Ni certigas diskretan uzon de la respondoj, kaj publikigos la rezultojn de tiu ĉi enketo tie, kie vi legas nian demandaron. Ni esperas, ke viaj respondoj kondukos nin al pli precizaj demandoj. Antaùe dankon.

Bonvolu sendi viajn respondojn al

A C R E
292, Bd des Bressons
F - 13300 Salon de Provence (Francio)

*****************************************************

## SUBTENU LA DISVASTIĜON DE Esperanto EN RADIO

En somero en Germanio okazos la Universala Kongreso (UK) kaj la Internacia Junulara Kongreso (IJK). Tio povas esti ŝanco, enkonduki Esperanton en la programon de la germana mallongonda radiostacio "Deutsche Welle". Sed por esperantiĝi ĝin, estas bezonataj sufiĉe multe da demandoj pri E-elsendoj. Do, bv. helpi kaj skribi nacilingve poŝtkarton aù leteron al : Deutsche Welle, Postfach 100 444, D - 5000 Köln 1, FR.Germanio.

1. Se vi ne partoprenos la kongresojn, vi povas skribi, ke vi volonte venus pro la UK aù pro la IJK al Germanio, sed tio ne eblas pro tiu aù jena kaùzo. Poste skribu, ke vi almenaù ŝatas aùskulti radioelsendojn E-lingvajn pri Germanio kaj pri la koncerna kongreso. Demandu, ĉu la Deutsche Welle intencas enkonduki programon en la internacia lingvo al via regiono.

2. Se vi partoprenos kongreson en Germanio, vi povas skribi tion al la Deutsche Welle kaj krome, ke vi jam nun interesiĝas pri Germanio. Demandu ĉu la Deutsche Welle elsendos programon en Esperanto al via regiono. Vi povas mencii, ke Radio Pekino elsendas kvar duonhorajn elsendojn ĉiutage kaj Radio Polonia eĉ ses tiajn, ke la E-lingva redakcio de Radio Polonia ricevas la plej multajn korespondaĵojn post la Germana, aù alian fakton pri aliaj E-lingvaj radiostacioj.

komuniko de **G. E. J.**

*****************************************************

## ESPERANTISTAJ FERIADOJ en MIĘDZYGÓRZE

Vroclava Filio de Pola E-Asocio invitas al tradiciaj E-feriadoj en Międzygórze

La 4a Internacia Feriado "Esperanto hejme", kiu okazos en la tagoj 1985.08. 18-31

La 21-a Internacia E-Feriado "Ora pola aùtuno", kiu okazos en la tagoj 1985.09. 02-15.

En ĉiu feriskipo samtempe ferios 430 esperantistoj.

LOKO : Pitoreska ripozloko Międzygórze en Sudety-montaro, 130 km sude de la regiona urbo Wrocław. Enloĝigo kaj programo en 14 apude situantaj alpstilaj ripozdomoj de la Ferientrepreno "FWP". Ĉarmaj pejzaĝoj, pura aero, profundaj boskoj, kristalakvaj torentoj, milda klimato kaj kvieto reganta en Międzygórze kurace helpas al personoj lacigitaj de industria civilizacio. En ĉirkaùaĵo atrakciaj piedaj kaj aùtomobilaj turismaj itineroj. M. estas pilgrimloko al Maria la Neĝa kronita de papo Johano Paùlo la Dua.

PREZOJ : Partoprenkotizo por dusemajna restado por esp-istoj estas 180 dol. aù egalvaloro en alia valuto, por samtempe aliĝantaj familianoj 170 dol. kaj por neesp-istoj - 210 dol. Prezo por ambaù feriadoj (4 semajnoj) estas 350 dol. La prezo inkluzivas loĝadon en 2 aù 3-personaj ĉambroj, manĝadon, kursojn kaj kulturan programon.

PROGRAMO : Diversgradaj konversaciaj kursoj, kultura kaj distra programo en E., montaraj piedekskursoj, ĝojfajro, lumbildprelegoj, kantvesperoj, diskdancado k.a. Samtempe okazas kelkaj kursoj aù programoj laùvole elekteblaj. En la feriskipo "Esperanto hejme" riĉa kaj atrakcia programo por infanoj kaj internacia renkontiĝo de esperantistoj-bibliotekistoj.

En la feriskipo "Ora pola aùtuno" esperantologia seminario kaj internacia renkontiĝo de esperantistoj-medicinistoj.

ALIĜOJ : Aliĝojn akceptas kaj detalajn informojn sendas : Pola Esperanto-Asocio, P.O. Kesto 16, PL 50-952 WROCŁAW 17, Pollando.

*****************************************************

**ŜVIT-KUNVENO EN "Laùtejo" :** De la 24a ĝis la 31a de aùgusto '85 pluraj "laùtuloj" mem preparos la septembran "Laùte!" en la "Laùtejo" mem. Surloka tendumado kaj manĝpreparado. Sensalajra ŝvitlaboro ! Interesatoj (eĉ por nur 1-2 tagoj) bonvenaj. Leteru al C.Baudé, F 47340 Laroque.

## HISTORIO DE LA E-MOVADO EN RUSILJONO

Kadre de la centjariĝo de Esperanto (1887-1987) la dumonata revuo CONFLENT ("Les Castors", 3 rue des Mimosas, F 66500 PRADES) dediĉos specialan n-ron al "Histoire du Mouvement Espérantiste en Roussillon" redaktita en la franca fare de Jean Amouroux, Marie-Thérèse Lloancy kaj Robert Lloancy.
Tiu zorge prezentita eldono aperos en septembro 1985 kaj enhavos pli ol 100 tekstajn paĝojn kaj multegajn ilustraĵojn. Prezo : 45 FF (afrankite). Rabato ekde 10 ekzempleroj. Aldoni la pagon al la mendo.

**************************************************************************

## ESPERANTISTA PERIGORDA GRUPO

La 18an kaj 19an de majo okazis en Périgueux-Trélissac renkontiĝo de la Esp-istoj de Sudokcidenta Francio. Proksimume 50 personoj partoprenis. Sabaton vespere oni prezentis lumbildojn pri diversaj temoj : tradicia fabrikado de juglanda oleo, japanaj kutimoj, infan-desegnoj. Dimanĉon matene, kelkaj partoprenantoj vizitis la truf-muzeon en Sorges. La urbestro de Trélissac donacis honoran vinon. Post la komuna tagmanĝo kelkaj lernantoj el Le Fleix (24) trapasis unuagradan ekzamenon.
Zen-fakulo prelegis pri tiu temo, sekvis diskuto kun la ĉeestantoj.
Ĝis la venonta renkontiĝo en Angulemo (16) okaze de la Zamenhofa Tago !
Filatelian memoraĵon pri la renkontiĝo de la 18/19-ajn de majo eldonis la Esperantista Perigorda Grupo. Informojn pri ĝi oni povas peti de :
Jacques MAURIANGE, Place Roland Grandou, F 24640 CUBJAC.

**************************************************************************

## MALLONGA BIBLIOGRAFIO (franclingva) PRI LA TEMO "LA PACISTOJ KONTRAŬ PACO ?" (vd. p.10)

* Vladimir Boukovsky, Les Pacifistes contre la paix, Laffont, Paris, 1982.
* Cornelius Castoriadis, Devant la guerre, t. 1, Fayard, Paris, 1981.
* IZTOK : dossier pacifisme, n°7, sept. 1983 (liberecana revuo de orient-eùropaj landoj.
* En esperanto : debato pri pacismo, Villandraut-ĵurnalo, eldonita de SAT-JF (mendebla ĉe M. Bauret, 17 rue Utrillo, F 33140 Villenave [5 FF])

**************************************************************************

**TUTMONDA E-ADRESARO** : Multaj E-istoj sopiras al Tutmonda Esperantista Adresaro. Info-Servo (Bismarckstr. 28, D 3550 Marburg) eldonis iun en 1981/82 kun ĉ. 2700 adresoj. La sama eldonanto planas ĝisdatigitan T.E.A-on kun ĉ. 7000 adresoj. Sed tio eblos, nur se alvenos sufiĉe da antaùmendoj. La antaùmendintoj ricevos la libron tuj post ĝia apero. Ne antaùpagi. La prezo estos inter 7 kaj 12 gmk. (Se ĝi devus superi 15 gmk, tiam la eldonado ne okazus). Por tiu entrepreno ebias ankaù mondonaci. Se vi ne ricevis ĝin, petu respondilon/mendilon al Info-Servo.

**************************************************************************



## EL MIAJ LEGADOJ

*Mi ĵus finlegis la ĉi-jaran numeron de **Sennacieca Revuo.** Kiel kutime, ĝia tuta enhavo estas interesa. El ĝi mi distingas aparte du artikolojn : tiun de Lilio Grandière "Pri rasoj kaj rasismo" kaj tiun de Michel Duc Goninaz pri "Rajto je komunikado kaj lingva libereco. Ĉu diverĝaj celoj ?"*

*La artikolo de Lilio Grandière liveras al ni sciencajn argumentojn, per kiuj ni povas plifortigi nian instinktan, sentimentan kontraŭrasismon. Tio estas utila en tempo, kiam iuj pseŭdoscienculoj pretendas ĝustigi la rasismajn tezojn per teorioj ĉerpitaj el freŝdataj eltrovoj de biologio - sed la veraj biologoj nete kontraŭdiras tiujn konkludojn.*

*Nur pri unu aserto mi ne tute konsentas. Mi citas : "Certe tiuj konceptoj (rasistaj) kongruas kun pli-malpli konsciaj tendencoj, kiuj evidentiĝas jam ĉe infanoj. La infanoj timas ĉion fremdan, kaj la timo fariĝas defendreflekso, kiu efektiviĝas tra forkuro aŭ agresiveco". Nu, mi ofte konstatis, ke junaj infanoj, eble ĝis maksimume la 10a jaro, ne faras diferencojn inter siaj samaĝaj kamaradoj, kia ajn estas ilia haŭtkoloro. La rasismo aperas poste, pro influo de la medio familia kaj ekstera. Rasismo ne estas natura, sed socia, kultura fenomeno, artefarita. Oni aŭdas gurditajn sendiskutajn asertojn : "La judoj estas fia raso, la afrikanoj estas ĉiuj pigremaj, mensogemaj, ŝtelemaj, la azianoj estas kruelaj, la enmigrintoj venas manĝi nian panon, ili estas kaŭzantoj de senlaboreco, kostas multe al la socia asekuro", ktp. Tiajn falsaĵojn oni senkontrole ripetas, kaj ili fariĝas komuna popola opinio.*

*La artikolo de Duc Goninaz enhavas plurajn sagacajn analizojn kaj plurajn pripensindajn ideojn, kiuj povas helpi nin esperantistojn, por pli ĝuste, pli celkonscie, pli utile orienti nian agadon.*

*Tiujn du artikolojn (ankaŭ la ceterajn) ni relegu kaj primeditu.*

***Valo***

**************************************************************************

En beleta verdaĵa loko, nova kaj bela etapkuŝejo (50 litoj) malfermiĝis en Trescléoux (valo de la Buech), en departemento Altaj Alpoj (Francio). Vi trovos koran akcepton kaj multnombrajn aktivaĵojn : piedmigradojn, arkpafadon, "delta-flugilojn", grimpadon, turismo-bicikladon, ktp...

La etapkuŝejo estas malfermita la tutan jaron. La 27an kaj 28an de julio : 2 gvidataj piedmigradoj, unu okazos nokte... sub la lunlumo. La 21an kaj 22an de septembro : Esperanto-renkonto. Iomete da inicado pri E por la neesperantistoj. Esperantistoj, neesperantistoj, venu multnombre al la etapkuŝejo de Mont-Garde. Atendas vin : Lucette Lacoste, Gîte d'étape du Mt Garde, Trescléoux, F 05700 SERRES. Tel: 16(92) 66 25 72.

## LA ESPERANTO-MOVADO EN ĜIRONO (KATALUNIO)

En ordinara asembleo okazinta lastan februaron oni elektis kiel sekretariinon Montserrat Poch Dagà kaj Emili Aguilar kiel voĉdonanton, de la E-grupo "Girona Espero". Oni ankaŭ konsentis pri la senpaga membreco al la E-grupo, de gelernantoj, kiuj finos la nunajn E-kursojn.

Dum la monata kunveno de Loka Komitato, la 30an de marto, estis akceptita Junulara Fako, kies prezidanto estas Jordi Serra Mestres. Okaze de la Libro-Festo, la 23an de aprilo, sub ŝildo de "Joves Esperantistes", sur "Rambla" stariĝis lokvendejo de rozoj kaj E-libroj ; kelkaj gejunuloj estis varbitaj por venonta somera E-kurso. La profito de la vendo estos uzebla por desegnfarbi pri E sur muro en nova kaj granda Eŭropa Placo. Do, ekde la 16a de junio la pertrajnaj vojaĝantoj, kiuj transiros Ĝironon, povos vidi verdan flagon ĉ. ses metrojn longan, farbitan kun la nomo ESPERANTO supre.

Por festi la finon de la E-kursoj, dimanĉon 23an de junio, okazis kampara tagmanĝo apud fonto en St-Daniel valo.

**********************************************************************

**EN FRANCIO** : Eblas mendi ĉe Groupe d'Action pour l'Espéranto, 123 rue de Royan, 16710 ST YRIEIX, kaskedon kun surskribo "Esperanto - La langue internationale", E-ŝildon, kaj nova E-poŝtkarton ("Nous voulons apprendre l'espéranto à l'école"). Specimeno de tiuj tri artikloj estas ricevebla kontraŭ 33,70 FF (afrankite). Rabato ekde 5 ekzempleroj.

**********************************************************************

## En la eldonprogramo de SAT-broŝurservo

* De Lucien BOURGOIS (la kompilinto de "Laŭ la fluo de l'interparolo") :

**PROVERBARO FRANCA-ESPERANTA**

kun aldono : **Esprimoj sankciitaj de l' uzado.**

Temas pri reeldono, post reviziado kaj kompletigo, en A5-formato, kun ilustraĵoj de Jean-Paul PERU. La prezo estas ankoraŭ ne fiksita, sed ĝi estos kiel eble plej malalta, kiel por la ceteraj eldonaĵoj de SAT-Broŝurservo .

Antaŭmendoj (ne necesas antaŭpagi) helpos fiksi la eldonkvanton... kaj certigos al vi eviti, pro tro malfrua mendo, la ne ĉiam agrablan informon : "Elĉerpita".

(Apero antaŭ la fino de 1985).

* Por 1986, nova traduko de nia "piliero" VALO :

**EL LA PENSOJ DE PASKALO**

(ekstraktoj el la franca originalo esperantigitaj)

Se vi deziras plifortigi tiun jam imponan eldon-entreprenon, nepre fariĝu broŝurabonanto ! (per minimuma 100-franka provizo al CERCLE AMICAL ESP. AGENAIS, pĉk : 3371 74 M Bordeaux.)

# LA BROŜURSERVO DE S.A.T.

## Iom da historio...

La vera naskiĝo de la Broŝurservo (BS) koincidas kun la t.n. "bordoza" kaj "laroka" (en Laroque Timbaut) periodoj (1965-1970) de la nun mortinta **"La Juna Penso"**, antaŭa organo de SAT-Junulfako.

Komence, al la regule aperanta dumonata bulteno la tiamaj prizorgantoj de LJP deziris aldoni unu aŭ plurajn "suplementojn" kiel specon de premio por logi novajn abonantojn kaj samtempe publikigi tekstojn, kiujn, pro ilia amplekso, oni ne povis ŝovi en "LJP"-n.

Pro sia ĝenerale modesta (se ne mizera !) aspekto kaj sia formato (21x27), tiuj suplementoj tute similis la ordinaran serion de la junulfaka gazeto. Ĉar, kompreneble, tiuj "suplementoj" estis akireblaj ankaŭ aparte fare de neabonantoj, ĉar ilia nombro senĉese pligrandiĝis, dum ilia aspekto iom post iom plibeliĝis, tial alvenis periodo, kiam aperis tiom da suplementoj, kiom da ordinaraj numeroj !

Kaj en 1971, kiam LJP transiris al Nederlando kaj tie disvolviĝis al ampleksa gazeto kun ĉ. 500 abonantoj, tiam paralele kvazaŭ oficialiĝis en Francio plu aperanta "broŝura serio" kun sama sinsekvo de numeroj, sed kun aldonaj literoj : 76A, 77A... Fakte, tre rapide eĉ la numerado levis problemojn, ĉar tiam ekaperis pli da broŝuraj ol da gazetaj numeroj ! La broŝura(j) serio(j) fariĝis aparte aboneblaj. Ili mem "duobliĝis" al A kaj B-serioj ! Ekzemple, eblis iumomente ricevi la numeron 87 de la gazeto (publikigita en Nederlando), la numeron 87A (broŝura serio konsistanta el prilingvaj tekstoj kaj reeldonaĵoj) kaj la numeron 87B (la B-serio, aparte abonebla, entenis novajn originalajn aŭ tradukitajn tekstojn). Imagu! Kia konfuzo en la kapoj de la kompatinda abonantaro ! Kaj, ĉar la LJP-perantoj peris monon por ĉio, kiaj komplikaĵoj ankaŭ en librotenado !

Ekde 1974, la kaso de la broŝura serio oficiale sendependiĝis de tiu de la ordinara LJP-kaso. Tio koincidis kun la reveno de la gazeto al Francio (pariza periodo) kaj ve, ankaŭ, post promesplenaj jaroj, al ĝia regreso kaj, fine, al ĝia morto. En tiu agonia periodo kreskis la maltrankvileco de la duonfreneza "broŝurulo", kiu, en Laroko, plu eldonadis broŝurojn "suplemente" al gazetaj numeroj, kiuj ne plu regule aperis! Vere, kia kaĉo!

Sed tiu kaĉo ankoraŭ pli densiĝis... (La kompatinda leganto bonvolu tuj gluti tablojdon...). "Skismiĝinta" LJP-prizorgintaro lanĉis ekster SAT la nun faman revuon "La Kancerkliniko". Siaflanke, la regiona informfolio de "Aĝenia E-Rondo", kiu - ankaŭ ĝi! - aperis suplemente de LJP kaj poste fariĝis **"Laŭte!"**, decidis sendependiĝi, oficiale deklarante apartan ekziston fine de 1976... Kaj tiel la broŝura serio de LJP fariĝis broŝura serio de "Laŭte!", antaŭ ol fariĝi oficiale "broŝurservo de SAT" ekde 1981.

Tiel zigzage ni atingis la jaron 1985, kiam eblas bilanci (esperereble, provizore!) pli ol 130 diversajn eldonaĵojn (de 8-paĝaj ĝis la 330-paĝa "Inter Sovetaj Popoloj" en du volumoj), ne enkalkulante multajn reeldonojn. Sume, ĉ. 6000 paĝojn...

Ĉi-poste vi trovos kronologian sinsekvon kaj kompletan liston, laŭ kod-sinsekvo.

De la praepoko ĝis nun okulfrape plibeliĝis la aspekto. La formato fariĝis pli oportuna, ĝenerale laŭ normo A5 DIN, foje A6. Ekde 1982 ofsetado anstataŭis la stenciladon. La privata portebla "remington"-tajpilo lasis lokon al "Julia", la elektronika skribmaŝino tute pagita de abonantoj mem.

## Bilance...

Kvankam ŝvitiga kaj senhariga, la broŝura aventuro estis (kaj restas) entuziasmiga. Dank'al fidelaj "klientoj" kaj abonantoj, dank'al malavaraj donacantoj - al kiuj i.a. "Julia" dankas sian ekziston - la kaso restis sana dum la eldonaĵoj estas inter la plej etkostaj en Esperantio. Sed la BS troviĝas nun en malfacile superebla kulmino : unuflanke, atendantaj manuskriptoj, sana kaso, taŭga presmaterialo; kaj "grandioza" stoko da nevenditaj broŝuroj, ne sufiĉe da broŝurabonantoj, kaj superŝutiteco de la "broŝurulo", aliflanke.

La denuna orientiĝo - jam anoncita en 1984 - devus, laŭ mi, esti jena :

1 - Alvoko al ĉies helpo por la materia eldonlaboro (kvazaŭ "laborbrigadoj" de tempo al tempo ŝvitegantaj en la "Laŭtejo").

2 - Eldonado limigita al la nuraj broŝuroj, por kiuj estas garantiata disvendado de minimuma eldonkvanto.

3 - Organizado de reto el disvendantoj, krom la jam fidelaj E-libroservoj ; plimultigo de broŝurabonantoj.

Por la unua punkto estas ja laborpretaj geamikoj, sed ili loĝas ne proksime de la "Laŭtejo", kaj la broŝurulo sentas skrupulon peti de ili multekostan aŭtoveturadon por tedaj labortagoj. Aliflanke, multmembra - multbraka - "laborbrigado (kia aĉa vorto!) ofte malpli efike laboras ol 2-3 lertaj individuoj kun afinecoj. Tamen, kontentiga solvo certe ekzistas, ĉefe se oni reduktas la "produktadon" konforme al la dua punkto.

La tria punkto estas la plej tikla. Alvoko al disvendemuloj preskaŭ tute fiaskis. Iomete kreskis la nombro da BS-abonantoj (nun ĉ. 100).

Al ĉiuj, kiuj jam kunlaboris, nun helpas, kaj intencas estontece helpadi, dankon ! Sed, ĉar neniu kaj nenio estas eterna, mi, la broŝurulo, nun turnas min al la novaj generacioj : se ie troviĝas junaj energioj (prefere kolektivo el 3-4 personoj) pretaj daŭrigi kaj eĉ ankoraŭ pli prosperigi la BS-aferon, pri kiu mi skize ĵus raportis, ek ! estas la momento !

SAT-Broŝurservo estas ja unu el malmultaj entreprenoj, kie oni dungas nuntempe !

Kribo.

## Kronologia sinsekvo

Suplementoj de LJP

1968 : OK, RS, PE (LJP-gazeto en Laroko)
1969 : DK, FP, TR.
1970 : MS, EV, IE, JH, SL.
1971 : IK, GS, KT, LT, IE(reeld.), LE. (LJP en Nederlando)
1972 : AK, AS, SM, RP, NR, VK, NH, GR, EF.
1973 : PE (reeld), MM, EV, RI, MS, RR, EL, PP, PR, EH, NP, RS(reeld), LP, AO, AB, JD.
1974 : NM, PI, HP, PC, DU, PT, PO, CM, AC, TM. (LJP en Parizo)
1975 : A-serio : KĈ, IN, EA, AK, PP, EF, EH
B-serio : HM, KE, HH, MV, IM, LV, NA.
1976 : A-serio : GL, TM, DP, AC, PR, DU, EP.
B-serio : CM, KD, TH, RA, TK, TE, PB.
1977 : A-serio : LP, AO, PT, RR, EI, VL.
B-serio : IA, AD, FF, ND, AP, KI.
1978 : A-serio : NH, KK, PC, PI, LN, VK, EF.
B-serio : HA, PM, MI, MC, AG, AR1, PL.
1979 : A-serio : BA, LA, SP, ME, VO.
B-serio : IL, PN, VI, FV, ET.
1980 : A-serio : MS, EE, IE. B-serio : KP, SS, KF, BG, AR2.

SAT-Broŝurservo/"Laŭte!"

1980 : DI, AA, SJ, EV.
1981 : VT, IS, NE, NI, GE.
1982 : VL1, VL2, MM, AR3, MB, HS, IN, AJ, ĈS, SR.
1983 : EL, UN, MN, TP, ES, DI, SA, US.
1984 : EK, BU, NL, JA, FA, TD, VH, AL, EF.
1985 : FI, SN, LM, IE, VL3....kaj tiel plu.

## Kompleta listo, laŭ-koda

| Titolo (Aŭtoro/Trad.) | (Kvanto).Kodo.Prezo Elĉerpita aŭ |
|---|---|
| La Aperoj de Ahasvero (Han Riner/Valo) | (300) AA.15. |
| Absolutismo (Lanti) (troviĝas en VL1) | AB |
| Atomcentraloj (Levreaud) | (600) AC.Elĉ |
| Adamaĵoj (Lanti) (troviĝas en VL1) | AD |
| Antropogenezo (Pannekoek/Leereveld) | (250) AG. 8. |
| Al la Junuloj - Biografio (Kropotkin) | (40) AJ.Elĉ |
| Abundo kaj konsumsocio (J.Duboin/Abund.Frakcio) | (400) AK.Elĉ |
| Al la homa konscienco (A.P.R.J) | (640) AL. 5 |
| Anarkio kaj organizo (Malatesta/Kribo) | (450) AO. 4 |
| Amo per proverboj (Azevedo/Couto Fernandes) | (350) AP. 1 |
| Argentina novelaro (plena kolekto)(tr.Garrote) | (330) AR.15 |
| En anarkista socio... (J.Grave/Kribo) troviĝis en LV | (750) AS.Elĉ |
| La Bazoj de Anarkiismo (Balkanski/***) | (500) BA.15 |
| La Blankaj Gardistoj (Heiligstein/Barkoviĉ) | (500) BG. 6 |
| La racia kaj ateista budhismo (trad.) | (330) BU. 4 |
| Civila Malobeemo (HD.Thoreau/McClafferty) | (800) CM.Elĉ |
| Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio? (Lanti k Ivon) | (330) ĈS. 6 |

| | | |
|---|---|---|
| Kiel diri...? (Lentaigne) | (3000) | DI.20 |
| Durruti, simbolo de la hispana revolucio (Pario) | (525) | DU. 2 |
| Dictionnaire de poche | | DP.ElĈ |
| Esperanto in 24 pages | (800) | EA. 1 |
| Esperanto or English? (Masson) | (580) | EE.ElĈ |
| Espéranto de poche (antaŭe: Esp. en 24 p.) | (7100) | EF. 5 |
| Esperanto en 24 páginas (hispana) | (4940) | EH. 3 |
| Esperanto su 24 pagine (itala) | (450) | EI. 2 |
| L'Esperanto en 24 pagines (kataluna) | (900) | EK. 3 |
| El leteroj de Lanti (troviĝas en VL1) | | EL |
| Esperanto em 24 paginas (portugala) | (150) | EP.ElĈ |
| Por ekologia socio (Murray Bookchin/D.C.) | (500) | ES.12 |
| Etiko I (Kropotkin/tr.) | (400) | ET.12 |
| Eduko kaj vivsignifo (Krishnamurti/RFG,Kribo) | (500) | EV. 4 |
| Konstrui fajron (Jack London/D.C.) | (500) | FA. 4 |
| La Forto de la Fortaj (Jack London/Fröding) | (250) | FF.ElĈ |
| Laŭ la fluo de l'interparolo (L.Bourgois) | (500) | FI. 6 |
| Fronte al la vivo (Krishnamurti/Kribo) | (530) | FV. 4 |
| Funde l' puto (BGD) | | FP.ElĈ |
| Abrégé pratique de grammaire esp. (Lentaigne) | (900) | GE. 5 |
| La Guerre des Langues (Masson) (troviĝis en EE) | (200) | GL.ElĈ |
| Gandhi kaj satjagraho (diversaj aŭtoroj) | (700) | GS.ElĈ |
| La homa animo sub socialismo (O. Wilde/Kris Long) | (250) | HA.ElĈ |
| Herezulo - Herezaĵo (Lanti) (troviĝas en VL1) | | HH |
| Historia materiismo. Ĝeneralaj konsideroj pri la problemo de organizado (Pannekoek/31656, Sovetkom.frakcio) | (250) | HM.ElĈ |
| Humanitaristaj principoj (Eugen Relgis/Pragano) | (700) | HP. 2 |
| Historio de SAT (1953/1981) | (250) | HS.ElĈ |
| Henry-David Thoreau (Bazalgette/D.C.) (troviĝis en CM) | | HT ElĈ |
| Individuismo en Antikveco (Han Riner/Valo) | (250) | IA.ElĈ |
| Initiation à l'Espéranto (An Kaŭ) | (1750) | IE. 5 |
| Informkajero pri SAT | (1250) | IK.ElĈ |
| La Parlamentisma Iluzio (C.A.Laisant/FBG) | (250) | IL.ElĈ |
| Individuisma Manlibreto (Han Riner/Valo) | (450) | IM. 4 |
| La individualisma socialismo de D-ro Axel Robertson Proschowsky (Lagalaure) | (525) | IN. 2 |
| Inter sovetaj popoloj (P. Dikŝtejn) | (330) | IS.ElĈ |
| La jaro 2000 (Henri Muller/Abundana Frakcio) | (400) | JA.30 |
| Jen la Dio! (BGD) | | JD. 1 |
| Kiĉuaro (Dakapo) | (100) | KĈ.ElĈ |
| La Krimoj de Dio (Sébastien Faure/Carlos,Buokin) | (450) | KD. 3 |
| La Kvina Evangelio (Han Riner/Valo) | (500) | KE.14 |
| Kontraŭflue (Valo) | (400) | KF.10 |
| El la kara infaneco... (Valo) | (780) | KI.12 |
| Komuna Kantareto | | KK. 2 |
| Katastrofplano pri Fessenheim/ Verdikto pri Wyhl (tr. Lépeix) | (330) | KP. 5 |
| Kvarfolia Trifolio (BGD) | | KT.ElĈ |
| Lingvaj anguloj (Baronnet) | (630) | LA. 8 |
| La laborista esperantismo (Lanti) | (1000) | LE. 2 |
| La Mondo ne havas atendejon (Dekker/Faulhaber) | (350) | LM.15 |
| Linguistique et non-violence (Masson) | (700) | LN. 1 |
| La liberecana penso (tr. Liberecana Frakcio) | (400) | LP.ElĈ |
| La Tabuo (Nesvabda) | (670) | LT.ElĈ |
| Liberecanaj vivkonceptoj pri soci-organizado (Fontaura/Lib.Frakcio) + En anarkista socio kiel kondutos la individuo (Grav/Kribo) | (326) | LV.ElĈ |
| Imaga dialogo Marks/Bakunin (Cranston/D.C.) | (250) | MB. 4 |
| La inĝenia hidalgo Miguel Cervantes (Han Riner/Valo) | (250) | MC.ElĈ |
| La mistero de nia surtera ekzisto (Archdeacon/Caubel) | (330) | ME. 3 |
| La Migrantoj en Francio nuntempe (de Cazenove/Laval) | (250) | MI.ElĈ |
| Mem (BGD) | (600) | ElĈ |
| Migrante tra metioj (Valo) | (300) | MM.10 |
| Ĉu militista defendo estas kredebla? (Lasserre/Laval) | (350) | MN. 5 |
| Memvola servuto (La Boétie/Rol) | (450) | MS. 3 |
| Mia vivo (Bartelmes) | (700) | MV. 8 |
| Naciecaj problemoj (Roza Luksemburg/31656). Imperiismo, naciismo kaj socialismo (enkonduko de Lanti) | (250) | NA.ElĈ |
| Ĉu neperforta defendo aŭ civila, neperforta defendo? (kolektivo/Pacista Frakcio de SAT) | (300) | ND.ElĈ |
| Naciismo kaj esperantismo (S. Aarse) | (300) | NE. 6 |
| Manlibro de nova homo (Rufegon) | (740) | NH. 2 |
| Nia individuismo (E. Armand/D.C.) | (330) | NI. 4 |
| Notre individualisme (Armand) en la franca | (150) | NIf. 4 |
| Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo (Polak/Munniksma) | (500) | NL. 3 |
| Ne mortigu! (Tolstoj/Kribo) (troviĝas en VT) | (750) | NM. |
| La nova paradigmo en psikologio (Feldman Gonzalez) | (fine de '85) | NO.35 |
| Nekombitaj pensoj (S.J.Lec/Banacki) | (700) | NP.ElĈ |
| Ĉu neperforta revolucio... ? (T. Ebert/Pacista Frakcio) | (300) | NR.ElĈ |
| Originala Kantaro (Burger, Dakapo, BGD) | | OK.ElĈ |
| Poemaro (Bartelmes) (troviĝas en MV) | | PB. |
| La Parabolo pri la Cisterno (Bellamy/tr.) | (180) | PC.ElĈ |
| Lanti pri Edukado (Lanti) (troviĝas en VO) | (300) | PE. |
| La rajto de pigro (Lafargue/Kribo) | (415) | PI. 4 |
| Pri la Esperanta literaturo (Laval) | (400) | PL. 2 |
| Por nia medito (Alain/ Lanti) | (250) | PM. 2 |
| Politika neperforto (M.A.N./Pacista Frakcio) | (250) | PN. 6 |
| Paco en Proksima Oriento (Cohen/Masson) | (650) | PO.ElĈ |
| Por la Paco (/Pacista Frakcio de SAT) | (350) | PP.ElĈ |
| Prognozio (/tr. Madej) | (745) | PR.ElĈ |
| La Piramido de l' Tiranismo (Domela Nieuwenhuis/D.J.) | (375) | PT. 3 |
| Revolucia registaro kaj aliaj tekstoj (Kropotkin/Kribo) | (400) | RA. 5 |

| | |
|---|---|
| Rimarki (Krishnamurti/Rufegon) | (200) RI.ElĈ |
| La rentumo, kiun ni pagas (Schmid/Bierhoff) | (750) RP. 1 |
| Du rêve à la réalité (Masson) | (1050) RR.ElĈ |
| Rido sanigas ! (J. Burger) | (950) RS.ElĈ |
| Kio estas SAT ? (Masson) | (1000) SA.ElĈ |
| Sepdek Jaroj sub la verda stelo (Valo) | (400) SJ.10 |
| Sur la Monto (BGD) | (500) SM.ElĈ |
| Sveda Novelaro (div. aŭtoroj/Szilagyi) | (750) SN.30 |
| Pri la deklaro de principoj de mondsocialismo (tr.Kribo) | (100) SP.ElĈ |
| Les seize règles de l'Espéranto | (500) SR. 2 |
| Sindikatismo - Sovetoj (Pannekoek/Kribo) | (250) SS. 4 |
| Simpla lekanteto (BGD) | (500) SL.ElĈ |
| Tiel diru ! (Lentaigne) | (1000) TD.20 |
| Tabakismo kaj emancipiĝo (Masson) | (250) TE.ElĈ |
| La triviala homo (Ingenieros/Garrote) | (250) TH.ElĈ |
| Tiu, kiu ne volas morti (Jean Rostand/D.C.) | (350) TK. 1 |
| Tra la mondo per biciklo kaj esperanto (Alfa-Beta) | (875) TM.ElĈ |
| La Turo de l'Popoloj (Han Riner/Valo) | (500) TP.20 |
| La Tri Romioj (BGD) | TR.ElĈ |
| Unuflanka malamrmiĝo de Francio (UPF/Pacista Frakcio) | UM.ElĈ |
| Unu aŭ nul (Guy Marchand/Heredanto) | (500) UN.15 |
| Unueco super prokreda dividiĝo (Polak/Munniksma) | (600) US. 3 |
| Ĉu ni vere helpas la trian mondon ? (Glyn Roberts/ G.Robert) | (600) VH.10 |
| La Veraj Interparoladoj de Sokrato (Han Riner/Lanti) | (330) VI.15 |
| Vivi en komunumo (M. Schneller/Kribo) | (750) VK.ElĈ |
| El verkoj de Lanti, unua volumo (Adamaĵoj, ekstraktoj el Leteroj, Absolutismo, Herezulo, Herezaĵo) | (390) VL1.18 |
| El verkoj de Lanti, dua volumo (Tri semajnojn en Rusio, Tro Plena Gramatiko, Diskutejo, Epiloge) | (360) VL2.18 |
| El verkoj de Lanti, tria volumo (Artikoloj, Leteroj, Prelegoj, 1937-46) | (400) VL3.20 |
| Vortoj de Kamarado E. Lanti | (750) VO.18 |
| El verkoj de Leo Tolstoj (Patriotismo kaj registaro, Al politikistoj, Ĥodinka, Ne mortigu!) (tr.) | (330) VT. 7 |

En la eldonprogramo :

La Zamenhofa Homaranismo (A. Caubel)
Proverbaro Franca/Esperanta (L. Bourgois)
Pensoj de Blazio PASKALO (tr. Valo)
Nia angorplena socio (Ŝimeĉka)
ktp...

**Baldaŭ elĉerpiĝos :**

AG. BG. MB. MM. NH. PI. PM. UN.

## Disvendas broŝurojn de SAT-BS :

**Mondskale :**
